

Grandbienuloj venis al Jellinge el multaj direktoj por pridrinki julon ĉe reĝo Harald, kaj fariĝis puŝiĝe en dormokameroj kaj ĉe la tabloj. Sed Orm kaj liaj ŝipanoj ne plendis pro la interpuŝiĝo, ĉar ili trovis bonan merkaton por siaj sklavoj kaj sukcesis ilin ĉiujn vendi, antaŭ ol komen- ciĝis la festotagoj. **Uzino 4**



## **UZINO 4**

*Legolibro kun originala*

*kaj tradukita beletro*

*Redaktis Franko Luin*

**eLIBRO**

*Aranĝis: Franko Luin*

**ISBN 91-7303-183-6**

*inko@omnibus.se*

*<http://www.omnibus.se/inko>*

JANUARO 2003

## Enhavo

Pri Uzino	4
Kiel oni pridrinkis julon ĉe reĝo Harald	
Bludenta ( <i>Frans G. Bengtsson</i> )	5
La horlo ( <i>Guy de Maupassant</i> )	49
Ĉu ekzistas anĝeloj? (3) ( <i>John Einar Åberg</i> )	88
La infano estas malsana ( <i>Ferenc Herczeg</i> )	97

## Pri Uzino

*Uzino estas legolibro kun variaj prozaj beletraj tekstoj, originalaj kaj tradukitaj. Kiel oni povas diveni el la nomo, ofte povas temi pri tekstoj daŭre prilaborataj, ĉapitroj el tradukataj romanoj, unuopaj noveloj, pli-malpli pretaj skizoj. Iujn oni povas trovi en alia formo en la interreto, aliaj aperas ĉi tie por la unua fojo. Ankaŭ tekstoj jam aperintaj en disaj gazetoj, sed malmulte konataj, povas trovi lokon en Uzino.*

*Ĉiu Uzino — la intenco estas, ke aperu pliaj — estos minimume 100-paĝa. Aŭtoroj, kiuj havas ion publikigindan povas sendi sian verk(er)on al [uzino@omnibus.se](mailto:uzino@omnibus.se).*

*Oni povas uzi ĉi tiun interretan medion por vekti la intereson de la legontoj, prezentante rakonton, novelon aŭ ĉapitron el originala aŭ tradukata romano, kies publikigo kuŝas en la fora estonteco.*

Franko Luin

## Kiel oni pridrinkis julon ĉe reĝo Harald Bludenta

**G**randbienuloj venis al Jellinge el multaj direktoj por pridrinki julon ĉe reĝo Harald, kaj fariĝis puŝiĝe en dormokameroj kaj ĉe la tabloj. Sed Orm kaj liaj ŝipanoj ne plendis pro la interpuŝiĝo, ĉar ili trovis bonan merkaton por siaj sklavoj kaj sukcesis ilin ĉiujn vendi, antaŭ ol komenciĝis la festotagoj. Post kiam Orm disdonis la vendosumon, liaj ŝipanoj sin sentis riĉaj kaj kontentaj; kaj nun ili sopiris veni hejmen al Lister por montri, kion ili akiris, kaj ekscii, ĉu atingis hejmen la du ŝipoj de Berse, aŭ ĉu nur ili solaj travivis la ekspedicion de Krok. Sed dum la festotagoj ili volonte restos en Jellinge; ĉar pridrinki julon ĉe la reĝo de la danoj estas granda honoro, kiu por ĉiam grandigas la reputacion.

Plej elstara inter la gastoj estis la filo de reĝo Harald, reĝo Sven Dubarba, kiu venis de Hedeby kun granda akompanantaro. Li estis filo de kromvirino same kiel ĉiuj gefiloj de reĝo Harald, kaj inter li kaj lia patro estis mal-

bona etoso, tiel ke unu ne volis vidi la alian. Sed ĉe julo reĝo Sven ĉiam kutimis veni al Jellinge, kaj ĉiuj konis la kialon. Ĉar ĉe julo, kiam manĝaĵoj kaj trinkaĵoj estas plej abundaj kaj plej nutraj, ofte okazis, ke maljunuloj urĝe mortis, en lito aŭ ĉe pokalo; tiel okazis al maljuna reĝo Gorm, kiu post grandega porcio da julolardo dum du tagoj kuŝis senvoĉa kaj post tio mortis; kaj reĝo Sven volis sin trovi, kie la trezorkestoj sin trovas, kiam elviviĝos lia patro. Multajn julojn li ĝis nun venis vane, kaj lia senpacienco kreskis ĉiun jaron. Liaj kunuloj estis egaj bataluloj, malcedemaj kaj memfidaj, kaj al ili estis malfacile havi pacon kun la domanaro de reĝo Harald; kaj tio estis eĉ pli malfacila nun, post kiam reĝo Harald kristaniĝis kaj multaj el liaj kunuloj kun li. Ĉar reĝo Sven sin tenis al la antikva doktrino kaj kolere ridis pri la konvertiĝo de la patro; li diris, ke mokindaĵo tia ne trafus la danojn, se la antikvulo havus saĝon morti en konvena jaro.

Sed ĉi tion li ne laŭte diris restante en Jellinge, ĉar reĝo Harald facile falis en furiozon, kaj tiam estis danĝera por ĉiuj. Salutinte ili havis nenion por diri reciproke al si, kaj sidantaj en siaj ĉefseĝoj en la festenhalo ili ne pli ol necese unu la alian altostis.

En la tago antaŭ julo leviĝis neĝoŝtormo, sed poste sereniĝis kaj fariĝis malvarme, kaj en la mateno de la

jultago mem, kiam la pastroj kantadis meson de Kristnasko kaj la reĝbienon envolvis bonodora vaporo, kiun dispelis la preparoj en la kuirdomo, alvenis longŝipo de sude kaj sin direktis kun ŝtormŝirita velo kaj glacikovritaj remiloj al la pontoj. Reĝo Harald sidis aŭskultante la meson, kaj oni lin vekis por prezenti la informon; li faris al si demandojn pri tio, kiuj estas tiuj gastoj kaj iris al la supra galerio por rigardi la ŝipon. Ĝi estis alta ŝipo; kaj la ruĝa drakokapo sidis alte sur kurba kolo kaj portis glacieron inter la makzeloj kaŭze de la forta ondado. Oni vidis virojn kun ŝelo de glacio sur la vestoj surtreti la bordon, kaj inter ili venis altkreska ĉefulo en blua mantelo kaj alia en ruĝa; la ruĝe vestita estis eĉ pli alta ol la alia. Reĝo Harald ĉion rigardis tiel nete, kiel eblis distingi je la distanco, kaj diris:

—Aspektas kiel ŝipo de Jomsvikingoj, aŭ ĝi venas de la svea lando; kaj ĝi entenas fierajn homojn, ĉar ĝi venas al la reĝo de la danoj per sola ŝipo ne montrante pacoŝildon. Sole nur tri virojn mi konas, kiuj kuraĝas tion: Skoglar-Toste kaj Vagn Åkesson kaj Styrbjörn. Kaj la ŝipo alvenas kun la drakokapo neformatita malgraŭ tio, ke oni scias, ke la terkoboldoj tian vidon ne ŝatas; kaj mi konas nur du, kiuj ne atentis pri tio, kion pensas terkoboldoj: Vagn kaj Styrbjörn. Kaj estas videble, ke la ŝipo ne serĉis ŝirmon dum la ŝtormo, kaj mi konas nur unu,

kiu ne serĉas ŝirmon dum vetero tia, kia ĝi estis dum la pasinta nokto. Tial laŭ mia kredo la venanto estas Styrbjörn, mia bofilo, kiun mi dum kvar jaroj ne vidis; kaj tio konformas kun la blua mantelo; ĉar li portas bluan mantelon, ĝis li rekiros tion, kion li heredis de sia patro reĝo Erik. Kiu estas la alia, kiu estas almenaŭ tiom altkreska kiel li, tion mi ne kun certo povas diri; sed la filoj de Strutharald estas pli altkreskaj ol aliaj, ĉiuj tri, kaj amikoj de Styrbjörn. Ne povas esti Sigvalde Jarlo, ĉar li ne sentas sin komforta ĉe julfestenoj nun pro la moko, kiu lin trafis, post kiam li retroremis ĉe Hjörungavåg; kaj Hemming, lia frato, sidas en Angloloando. Sed la tria estas Thorkel Höge, kaj tiu ĉi povas esti li.

Tiel diris reĝo Harald, kies saĝo estis granda; kaj kiam la fremduloj atingis la reĝodomon kaj fariĝis evidente, ke li pravas, li fariĝis pli gaja ol iam, de kiam alvenis reĝo Sven. Styrbjörn kaj Thorkel li bonvenigis kaj tuj ordonis hejton de la bankabano kaj alvokis bieron al ili ĉiuj.

—Tio povas esti bezonata post tia vojaĝo, li diris, eĉ por bataluloj plej bravaj; kaj tio estas vero, kion kutimis diri la maljunaj:

*Varma bier' por frida vir',  
kaj same por laculo,  
ĉar tio estas korp-inspir',  
mirinda mens-stimulo.*



Kelkaj el tiuj, kiuj venis kun Styrbjörn, estis tiel elĉerpitaj, ke ili tremadis; sed kiam trinksiteloj kun varma biero estis alportitaj, iliaj manoj tuj stabiligis, tiel ke eĉ ne guto elverŝigis.

—Kaj post via ripozo en la bankabano la julfesteno komenciĝos, diris reĝo Harald; kaj al tiu festeno mi havas pli da inklino nun, ol kiam mi nur mian filon povis vidi trans la tablo.

—Ĉu la Dubarbulo estas ĉi tie? demandis Styrbjörn kaj ĉirkaŭrigardis. Kun li mi volonte parolos.

—Estas lia espero, ke li vidos min morti pro multa biertrinkado, diris reĝo Harald; tial li ĉeestas. Sed se mi mortos dum julfesteno, la kaŭzo estos tiu, ke min trafis enuo pro liaj malicaj mienoj. Vi havos parolon kun li en konvena tempo; sed unu aferon mi volas ekscii: ĉu sango estas inter vi kaj li?

—Sango ne estas inter ni, respondis Styrbjörn, sed eble estos. Li promesis al mi helpon de ŝipoj kaj viroj kontraŭ mia parenco en Upsalo, sed neniuj venis.

—Nun estas moro ĉe mi, diris reĝo Harald, ke neniuj kverelo devas okazi dum la sanktaj tagoj; kaj mi volas, ke vi jam nun tion sciu, eĉ se tia kvieto estas malfacila por vi. Ĉar mi nun tenas min al Kristo, kiu helpis al mi en multo; kaj Kristo toleras neniun malpacon en la tago de julio, kiu estas la tago de lia naskiĝo, kaj ankaŭ ne en la sanktaj tagoj poste.

—Mi estas homo sen tereno, diris Styrbjörn, kaj paco kostas al mi tro multe; ĉar mi estas tia, ke mi preferas esti korvo ol hakato de korvo. Sed kiam mi estas gasto ĉe vi, mi kredas, ke mi povos teni la pacon same bone kiel iu alia, estru kiuj ajn dioj la feston; ĉar vi estis bona bopatro, kaj kun vi mi neniam kverelis. Sed ja vere, ke mi nun devas diri al vi, ke via filino Tyra mortis; kaj mi preferus, ke mi povus veni al vi kun pli bonaj novaĵoj.

—Tio estas informo por funebro, diris reĝo Harald. Kio ŝin mortigis?

—Ŝin ĉagrenis tio, ke mi prenis al mi vendan kunkuŝulinon, diris Styrbjörn, kaj ŝin kaptis tia furiozo, ke ŝi sputis sangon, kaj post tio ŝi velkis kaj mortis. Sed cetere ŝi estis bona edzino.

—Tion mi jam longe rimarkas, diris reĝo Harald, ke junaj homoj mortas pli facile ol maljunaj. Sed nun ni ne tro lasu tion malheligi niajn pensojn, kiam ni pridrinkos julon; kaj ankoraŭ restas al mi tiom da filinoj, ke mi ne scias, kien meti ilin. Ili ĉiuj estas malhumilaj kaj volas edziniĝi nur al altranguloj kun granda famo; kaj ne longe vi bezonas sidi vidva, se iu plaĉos al vi. Mi ilin ĉiujn montros al vi; kaj povos okazi, ke inter ili mankos Kristnaskpaco pro tio.

—Aliaj aferoj ol edziĝo estas en miaj pensoj, diris Styrbjörn; sed pri tio ni poste parolos.

El malantaŭ pordoj kaj el subtegmentejoj multaj okuloj rigardis Styrbjörn, kiam li iris al la bankabano kun siaj kunuloj, ĉar li estis malofta gasto kaj la plej granda el ĉiuj bataluloj en la Nordlandoj post tiam, kiam vivis la filoj de Lodbrok. Li havis blondan barbon mallonge tranĉitan, kaj pale bluajn okulojn; kaj tiuj, kiuj neniam antaŭe lin vidis, surprizite murmuris inter si, ke li estas viro svelta kaj gracia. Ĉar ĉiuj sciis, ke li havas forton tian, ke li per sia glavo, kiu nomiĝas Lulkanto, fendas ŝirmilojn kiel panojn, kaj batalkostumitajn virojn de kolo ĝis skroto. Sciantaj personoj diris, ke la tradicia bonŝanco de la Upsala klano sin trovas ĉe li kaj ke ĝi donas al li liajn forton kaj sukceson en ĉiuj riskaj entreprenoj. Sed estis bone konata ankaŭ tio, ke ankaŭ iom el la malbono kaj malnova malbonsorto sin ligis al li; tial li estas senlanda ĉefulo; kaj jen la kaŭzo, kial iujn fojojn laceco kaj granda melankolio lin prenis. Tiam li kutimis sin enfermi sola kaj tagon post tago kuŝi ĝemante kun morna murmurado, tolerante neniun homon en sia proksimo, krom virino, kiu kombis liajn harojn, kaj maljuna harpoludanto, kiu enverŝis al li bieron kaj ludis malgajajn melodiojn. Sed tuj, kiam la melankolio cedis, li rapidis enŝipiĝi kaj entreprenis militirojn, kaj la plej harditajn el siaj ŝipanoj li tiam povis lacigi kaj timigi per siaj sentimego kaj mizera veterbonŝanco.

Tial lin ĉirkaŭis teruro, kiu superis tiun de la aliaj ĉefuloj, kvazaŭ loĝus en li iom el la potenco kaj danĝero de la dioj mem; iuj kredis, ke li verŝajne iam, kiam lia forto estos plena, iros al Miklagordo kaj eksidos kiel imperiestro tie kaj ĉirkaŭvelados la teran rondon kun multnombregaj ŝiparoj.

Sed aliaj diris, ke ili povas vidi en liaj okuloj, ke li mortos juna kaj en mizero.

Nun ĉio estis preta por julfesteno en la granda halo de reĝo Harald, kaj ĉiuj viroj sidiĝis sur la benkoj tie. Neniu virinoj kunsidis ĉe tiel granda drinkadkunveno; ĉar estas jam sufiĉe malfacile, opiniis reĝo Harald, teni pacon inter viroj solaj por si, kaj multe pli malfacile estus, se ili dum sia ebrio demonstrus sian bravecon antaŭ virinoj. Post kiam ĉiu ricevis sidlokon, la stalisto de la reĝo proklamis, ke regas en la halo la paco de Kristo kaj reĝo Harald kaj ke neniu eĝa fero estu uzata krom nur por tranĉi la nutraĵon: hakvundo kaj pikvundo, kaj ĉiu sanganta vundo, kiun kaŭzis iu viro al alia per biersitelo aŭ osto, lignotelero, lignokulero aŭ pugno estu kalkulata kiel plena mortigo kaj kiel malrespekto kontraŭ Kristo kaj nekompensebla ago, kaj ĉirkaŭ la kolo de la kulpanto ŝtono estu ligita, kaj li estu dronigita en profunda akvo. Ĉiujn armilojn krom la manĝotranĉiloj oni demetis en la antaŭĉambroj, kaj nur tiuj altranguloj, kiuj sidis ĉe la

tablo de reĝo Harald mem, portis siajn glavojn; ĉar oni pensis, ke ili povas sin bridi eĉ drinkinte.

La halo estis konstruita tia, ke sescent povu esti en ĝi sen puŝado, kaj en ĝia mezo staris la tablo de reĝo Harald mem, kie sidis la tridek plej honorataj altranguloj. La tabloj por la aliaj staris transverse en la halo ĉe ĝiaj ambaŭ ekstretoj. Ses ĉeflokoj estis ĉe la tablo de reĝo Harald, ĉe ĉiu flanko tri. Dekstre de reĝo Harald sidis Styrbjörn kaj maldekstre episkopo Poppo; meze kontraŭe sidis reĝo Sven kaj dekstre de li Thorkel Höge kaj maldekstre maljuna kaj kalva jarlo de la Malgrandaj Insuloj nomiĝanta Sibbe; la aliaj okupis lokojn konformajn al sia reputacio, kaj ĉe ĉi tiu tablo reĝo Harald mem difinis ĉies lokon. Ne estis Orm konsiderata granda ĉefulo, sed li ricevis pli ol atendeble favoran sidlokon kaj Toke same, ĉar reĝo Harald havis dankemon al ili pro la granda sonorilo kaj ŝatis la versfaradon de Toke. Orm sidis tria de la episkopo kaj Toke kvara; ĉar Orm diris al reĝo Harald, ke li ne volonte disigus sin de Toke, ĉar tiu povus kaŭzi ĉagrenojn pro la biero. Meze kontraŭ ili trans la tablo sidis ĉefuloj el la akompanantaro de reĝo Sven.

Nun la episkopo laŭtlegis preĝon, kiun mallongigi petis lin reĝo Harald, kaj post tio tri tostoĵ estis proklamitaj: je la gloro de Kristo, bonŝanco de reĝo Harald kaj reveno de la suno. Ankaŭ la nekristanoj partoprenis la

toston por Kristo, ĉar ĝi estis la unua tosto, kaj ili soifis bieron, sed iuj el ili faris martelosignon super la trinkokruĉo kaj murmuris la nomon de Thor antaŭ ol trinki. Kiam estis trinkata la tosto por la bonŝanco de Harald, biero venis al reĝo Sven en la spirogorĝon, kaj li tuis tiom, ke demandis Styrbjörn, ĉu la gluto estis al li tro forta.

Nun estis enportata la jula lardo; bataluloj kaj ĉefuloj silentiĝis, kiam ili vidis ĝin alveni, kaj ili profunde spiris kaj rikanis pro ĝojo; multaj malligis siajn talirimenojn por plene pretiĝi jam komence. Ĉar malgraŭ tio, ke certaj personoj asertis, ke oni ĉe reĝo Harald, dum lia nuntempa maljuneco, foje povas rimarki avarecon koncerne arĝenton kaj oron, nenio simila vortiĝis koncerne manĝaĵon kaj trinkaĵon, kaj plej malmulte de tiuj, kiuj ĉeestis julfestenon ĉe li.

Kvardek ok porkoj, bone grasigitaj per glanoj, estis la kvanto, kiun reĝo Harald kutimis buĉigi por la julo; kaj li havis la kutimon diri, ke eĉ se tio ne sufiĉas por la tuta julo, ĝi tamen konsistigas ioman gustumpecon por ĉiu, kaj post ĝi oni kontentiĝu per ŝafoj kaj bovoj. La kuirejaj homoj venis duope en longa vico portantaj inter si grandajn vaporantajn kaldronojn, aliaj portis trogojn kun sangokolbasoj. Kuirejaj knaboj kun longaj forkaj stangoj sekvis; post kiam la kaldronoj estis metitaj apud

la tabloj, ili ŝovis la stangojn en la brogaĵon kaj kaptis grandajn pecojn, kiujn ili vice kaj orde metis antaŭ la gastojn, tiel ke neniu estu eksterorde favorata; kaj antaŭ ĉiu ili metis minimume ulnon da sangokolbaso aŭ pli se iu deziris. Panoj kaj frititaj rapoj kuŝis en argilpladoj sur la tabloj; kaj ĉe la tabloekstremoj staris tinoj kun biero, tiel ke kornoj kaj kruĉoj ĉiam povu pleni.

Kiam la lardo venis al Orm kaj Toke, ili sidis senmovaj, turnitaj al la kaldrono, kaj sekvis zorge per la okuloj, kiel la kuirejknabo kaptoserĉis per la stango. Ili ĝemis pro ĝojo, kiam li trovis belajn pecojn de brustlardo por ili; kaj ili reciproke memorigis al si, kiom da tempo pasis de tiam, kiam ili sidis ĉe tia manĝo, kaj ili miris, ke ili dum tiom da jaroj povis elteni en senlarda lando. Sed kiam alvenis la sangokolbaso, venis al ili ambaŭ larmoj en la okulojn, kaj ŝajnis al ili, ke nenium normkvantan manĝoporcion ili ricevis post tiam, kiam ili forvelis kun Krok.

—Superas ĉion tiu odoro, diris Orm kviete.

—Timiano estas en ĝi, diris Toke per singulte rompita voĉo.

Li ŝovis sian kolbason en la buŝon, tiel longe kiel eblis, kaj ĝin mordis kaj ekmaĉis; post tio li rapide sin returnis kaj etendis la manon al la servisto, kiu volis daŭrigi sian iron kun la trogo, kaj pinĉis al li la kamizolon kaj diris:

—Donu al mi tuj pli da kolbaso, se tio ne estas kontraŭ la ordonoj de reĝo Harald, ĉar dum longa tempo mi estis mistraktata en la lando de la andaluzoj, kie ne estas nutraĵo por viroj, kaj la kolbasojn de sep juloj mi sopiris, sed ne gustumis.

—Same estas al mi, diris Orm.

La servisto ridis kaj diris, ke reĝo Harald havas sufiĉe da kolbasoj por ĉiuj. Li metis antaŭ ilin po unu plenan kolbason de la plej dika speco, kaj nun ili sentis sin trankvilaj kaj komencis manĝi serioze.

Nun ne multe estis parolata dum iom longa tempo, nek ĉe la tablo de la reĝo nek ĉe la aliaj, krom kiam viroj alvokis pli da biero aŭ inter la glutoj laŭdis la julmanĝojn de la reĝo.

Dekstre de Orm sidis juna viro, kiu tranĉis sian manĝaĵon per tranĉilo kun ornamita arĝenta tenilo; li havis helan haŭton kaj longajn kaj belajn harojn, kiuj estis zorge kombitaj. Li apartenis al la kunularo de Thor- kel Höge kaj estis evidente, ke li devenas de altranga familio, ĉar li sidas tiel proksime al la reĝo malgraŭ tio, ke li ankoraŭ estas senbarba; tion oni povis konkludi ankaŭ el tio, ke li portis delikatajn vestojn kaj glavozonon el arĝento. Kiam la plej diligenta manĝado jam ĉesis, li sin turnis kontraŭ Orm kaj diris:



—Ĉe festenoj estas bone sidi apud viroj vaste veturintaj; kaj ĉu mi ne aŭdis, ke vi kaj via najbaro estis pli distance for ol la pli multaj.

Orm respondis, ke tiel estas kaj ke li kaj Toke pasigis sep jarojn en Hispanujo.

—Ĉar el pluraj kaŭzoj, li diris, nia vojaĝo fariĝis pli longdaŭra ol ni atendis; kaj ĝin entreprenis multaj, kiuj ne revenis.

—Do vi havas por rakonti, diris la alia; sed malgraŭ tio, ke mi ne estis tiel longe for kiel vi du, mi tamen partprenis vojaĝon, de kiu malmultaj revenis.

Orm demandis, kiu li estas kaj kiu estis lia vojaĝo.

—Mi venas de Bornholmo, diris la alia, kaj nomiĝas Sigurd, kaj Bue Dika estis mia patro. Pri li vi eble ion aŭdis malgraŭ tio, ke vi longe estis eksterlande. Mi kunestis ĉe Hjörungavåg, kie li mortis, kaj tie mi kaptiĝis kun Vagn kaj aliaj. Kaj mi nun ne sidus ĉi tie kaj parolus kun vi pri tio, se ne estus miaj haroj longaj; ĉar miaj haroj savis mian vivon, kiam estis mortigotaj la kaptitoj.

Nun pluraj ĉe la tablo komencis satiĝi kaj fariĝi parolemaj; kaj Toke miksiĝis en la interparolon kaj diris, ke tio, kion rakontis la bornholmano, estas mirinda kaj certe estas aŭskultinda rakonto; ĉar li mem konsideris longajn harojn pli malutilaj ol utilaj por bataluloj. Thorkel Höge sidis pikpurigante la dentojn en tiu kortega manie-

ro, kiu fariĝis kutima inter vojaĝintaj altranguloj, forturante la buŝon kaj kovrante ĝin per la mano; li aŭdis ĉi tiun konversacion kaj diris, ke longaj haroj pli ol unu fojon pereigis batalulon, kaj ke tial prudentaj viroj ĉiam ligas la harojn sub la helmo, sed el la rakonto de Sigurd Buesson, li diris, eblas lerni, ke longaj haroj ankaŭ povas havi utilon por saĝa viro, kaj li esperas, ke ĉiuj en la halo havu eblecon aŭskulti tiun rakonton.

Reĝo Sven nun estis en bona humoro, kvankam li komence estis malkompleza vidinte Styrbjörn; li sin klinis malantaŭen en sia ĉefloko kaj rodas porkopiedon kaj elkraĉis ostetojn sur la plankopajlon, dum li kun kontento vidis kiel reĝo Harald, kiu parolis kun Styrbjörn pri virinoj, ankoraŭ ĉiam manĝis kaj trinkis pli ol iu alia. Li aŭskultis tion, kion oni diris pri longaj haroj kaj ekparolis pri tio kaj opiniis, ke prudenta batalulo devas pensi ankaŭ pri sia barbo; ĉar dum batalo en blova vetero la barbo facile povas ventleviĝi al ies okuloj, ĝuste kiam iu devus atenti pri bato aŭ ĵeto, kaj tial, li diris, li mem frue kutimiĝis je tio, ke la barbo li dum batalekspedicioj tenas plektita. Sed nun li volonte aŭdos, kiel utilis la haroj al Sigurd Buesson; ĉar viroj, kiuj alestis ĉe Hjörungavåg, ofte havas interesajn aferojn por rakonti.

Episkopo Poppo ne kapablis manĝi ĉion, kion oni metis antaŭ lin, kaj nun li sidis hikante pro la biero, sed tamen havis zorgon paroli. Li diris, ke li voleme rakon-

tus al ili ĉiuj pri la reĝido Abŝalom, kiun trafis malbon-sorto pro liaj longaj haroj; tio, li diris, estas bona kaj instrua rakonto, kiu estas skribita en la sankta libro de Dio mem. Sed reĝo Sven diris, ke tion oni rakontu al virinoj kaj infanoj, se ili havas paciencon aŭskulti; kaj inter li kaj la episkopo leviĝis kverelo pri tio. Tiam diris reĝo Harald:

—Tempo restas por multaj rakonti ĉe festeno kiel tiu ĉi, kiu daŭros dum ses tagoj; kaj malmultaj aferoj estas pli ĝuaj ol aŭskulti bonajn rakontojn, post kiam oni manĝis ĝis satiĝo kaj kiam ankoraŭ estas biero en la kruĉo. Ĉar tiel oni facile pasigas la horojn inter la manĝoj kaj malpli da kvereloj estas ĉe la tabloj. Kaj tion mi volas diri aldone al la honoro de la episkopo, ke li scikapablas bonajn rakontojn; ĉar multajn el ili mi mem aŭskultis kun ĝuo, pri sanktuloj kaj apostoloj kaj antikvaj reĝoj en la Oriento. Multe li rakontis al mi pri unu, kiu nomiĝis Salomono, kiu estis amata de Dio kaj simila al mi, kvankam estas vero, ke li havis pli da virinoj. Kaj nun estas mia penso, ke la episkopo rakontu la unua, antaŭ ol li laciĝos pro la manĝo kaj biero; ĉar ĉe juldrinkado li ne sentas saman komforton kiel ni, pro tio ke ne sufiĉe frue li alkitimiĝis. Kaj post li aliaj rakontu siajn: tiuj, kiuj estis ĉe Hjörungavåg aŭ kun Styrbjörn inter la vendoj aŭ en aliaj direktoj. Kaj ĉi tie ankaŭ sidas viroj, kiuj foresta-

dis ĝis la malproksimo de Hispanujo kaj alvelis al mi kun sankta sonorilo, kiu tre utilis al mi; kaj ankaŭ ilin ni volonte aŭskultos dum la daŭro de ĉi tiu festeno.

Ĉiuj tenis la opinion, ke reĝo Harald saĝe parolis, kaj kiel li diris, tiel fariĝis, kaj en tiu vespero, post kiam estis enportitaj la torĉoj, la episkopo rakontis pri la reĝo David kaj lia filo Abŝalom. Li parolis laŭte, tiel ke ĉiuj povis lin aŭdi, kaj kun multa saĝo; kaj ĉiuj krom reĝo Sven ŝatis lian rakonton. Kiam finparolis la episkopo, reĝo Harald diris, ke tiu rakonto estas bone memorinda, kaj por unu kaj por alia; kaj Styrbjörn ridis kaj tostis kun reĝo Sven kaj diris:

—Eble estas bona konsilo al vi, ke vi post nun tranĉu viajn harojn tiel mallongaj, kiel la episkopo tranĉas la siajn.

Reĝo Harald ŝatis tiun diron kaj frapis al si la femurojn kaj falis en tian ridon, ke skuiĝis la ĉefbenko; kaj kiam liaj kunuloj kaj tiuj de Styrbjörn vidis siajn mastrojn ridi, ili ĉiuj kunridis, ankaŭ tiuj, kiuj nenion aŭdis, tiel ke la tuta halo tremis. Sed la kunuloj de reĝo Sven tion malŝatis; kaj li mem fariĝis pala pro furiozo kaj ion murmuris kaj mordis al si la lipharojn kaj aspektis danĝera, kvazaŭ li estus preta sin ĵeti de la sidloko kaj fariĝi perfortema. Styrbjörn sidis antaŭenklinita kaj rigardis al li per siaj palaj okuloj, kiujn neniu palpebrumo fermis,

kaj ridetis; kaj estis nun granda malkvieto en la halo, kaj ŝajnis, ke marŝas la julpaco renkonte al ĥaoso. La episkopo etendis siajn manojn kaj ion kriis, kion aŭdis neniu, kaj viroj tenis unu la aliajn sub rigardo trans la tabloj kaj palpis por plej proksima frapilo. Sed la du amuzistoj de reĝo Harald, du nanaj ejraj viroj, kiuj havis vastan famon pro siaj artifikoj, nun saltis sur la tablon de la reĝo, en buntaj kamizoloj kaj kun plumoj en la haroj, kaj komencis flugile bati per siaj larĝaj manikoj kaj ŝveligis la bruston kaj alte levis la piedojn kaj etendis la kolon kaj kriis unu al la alia kiel kokoj, tiel ke ĉiuj pensis, ke ili neniam aŭdis kokon krei same bone; kaj baldaŭ ĉiuj jam forgesis sian koleron kaj sidis senpovaj pro rido ĉe iliaj artifikoj. Kaj tiel finiĝis la unua festentago.

En la sekvanta tago, kiam oni jam manĝis, kaj la torĉoj estis enportitaj, rakontis Sigurd Buesson pri tio, kion li travivis ĉe Hjörungavåg, kaj kiel utilis liaj longaj haroj. Ĉiuj bone konis tiun batalekskurson: kiel Jomsvikingoj kaj viroj de Bornholmo kaj Skanio elveladis kun granda ŝiparo sub la filoj de Strutharald kaj Bue Dika kaj Vagn Åkesson por akiri Norvegujon de Håkan Jarlo, kaj kiel nur malpluraj revenis de tiu klopodo; kaj Sigurd ne multon diris pri tio kaj nenion pri tio, kiel fuĝis Sigvalde kun siaj ŝipoj el la batalo. Ĉar estus malĝentile paroli pri Sigvalde, kiam sidas Thorkel Höge inter la aŭskultantoj,

kvankam ĉiuj sciis, ke Thorkel estas kuraĝa viro kaj ke en la batalo granda ŝtono frapis al li la kapon, kiam la ŝiparoj lokiĝis unu laŭlonge la alian, kaj li ne havis konscion, kiam lia frato remis for.

Sigurd estis en la ŝipo de sia patro kaj sin tenis al tio, kion li mem travivis. Li rakontis pri la morto de sia patro: kiel Bue, post grandega batalo, kiam la interpuŝado de norvegoj fariĝis granda en lia ŝipo, ricevis sur la vizaĝon glavohakon, kiu deprenis de li la nazon kaj pli grandan parton de la mentono, kaj kiel li tiam levis sian grandan trezorkeston kaj saltis en la maron; kaj kiel la prubatalisto de Bue, Aslak Holmskalle, berserkis sen helmo kaj ŝildo, jen io, kion oni ne ofte vidas nuntempe, kaj hakis per ambaŭ manoj kaj rezistis feron, ĝis bardo el Islando, kiu akompanis Erik, filon de Håkan Jarlo, levis amboson de la ferdeko kaj fendis lian kranion.

—Kaj ni, kiuj restis vivantaj en la ŝipo de mia patro, diris Sigurd, ne multon povis fari; ĉar ni estis malmultaj kaj tre lacaj; kaj ĉiuj niaj ŝipoj nun estis senhomigitaj krom tiu de Vagn mem, kie okazis ankoraŭ batalo. Ni estis premitaj al la pruo, kaj baldaŭ ni povis levi nek manon nek piedon; fine restis naŭ el ni, ĉiuj vunditaj, kaj tie ni estis premitaj inter ŝildoj kaj kaptitaj. Senarmilaj ni estis metitaj surteren; kaj baldaŭ venis ankaŭ la lastaj de la ŝipo de Vagn kaj inter ili Vagn mem. Li estis portata

de du viroj, kaj glavoj kaj lancoj jam markis lin, kaj li estis laca kaj pala kaj nenion diris. Ni estis sidigitaj sur trunko apud la strando, kaj niaj kruroj estis kunligitaj per longa ŝnuro, sed niaj manoj estis sen katenoj; kaj tie ni sidis atendente, dum iuj faris demandojn al Håkan Jarlo pri tio, kio okazu al ni. Lia decido estis, ke ni estu tuj mortigitaj; kaj Erik Jarlo, lia filo, venis vidi, kaj multaj kun li; ĉar la norvegoj estis scivolemaj vidi, kiel Jomsvikingoj sin tenas antaŭ la morto. Ni estis tridek sur la trunko, naŭ de la ŝipo de Bue, ok de tiu de Vagn, la ceteraj de aliaj; Vagn mem sidis plej dekstre. Kaj tiujn, kiujn mi konas el tiuj, kiuj sidis tie, mi nun nomos.

Post tio li nomadis ĉiujn, kies nomojn li sciis, laŭ la vico, en kiu ili sidis sur la trunko; kaj ĉiuj en la halo atente aŭskultis, ĉar multaj el tiuj, kiujn li menciis, estis konataj viroj, kaj iliaj parencoj estis inter la aŭskultantoj.

—Venis nun viro kun hakilo, daŭrigis Sigurd Buesson, kaj li haltis antaŭ Vagn kaj diris: "Ĉu vi scias, kiu mi estas"? Vagn lin rigardis, sed ne montris atenton pri li kaj nenion respondis, ĉar li estis tre laca. La alia diris: "Mi estas Thorkel Leira, kaj eble vi memoras la promeson, kiun vi faris, ke vi min mortigos kaj enlitiĝos kun mia filino Ingeborg." Veron li parolis, ĉar tiun promeson Vagn faris antaŭ la ekspedicio, aŭdinte ke la filino de Thorkel estas la plej bela junulino en Norvegujo kaj

ankaŭ unu el la plej riĉaj. "Sed nun," Thorkel Leira diris kun larĝa rikano, "pli kredeblas, ke mi mortigos vin." Vagn respondis ridetante: "Ne mortis ankoraŭ ĉiuj Jomsvikingoj." "Sed baldaŭ mortos," diris Thorkel, "kaj mi mem zorgos pri la afero, por ke ĝi ne estu fuŝata; ĉiujn viajn batalulojn vi vidis morti sub mia mano, kaj tuj poste vi ilin sekvos." Tion dirinte, Thorkel iris al la alia fino de la trunko kaj komencis senkapigi la kaptitojn, viron post viro laŭ sidvico; bonan hakilon li havis kaj estis fervora kaj neniam bezonis dufoje haki saman viron. Laŭ mia kredo la spektantoj ne povis diri alie, ol ke sin tenis la viroj de Vagn kaj Bue bone antaŭ la morto. Du, kiuj sidis proksime al mi, konversaciis pri tio, ĉu oni ion povas senti sen kapo, kaj akordis pri tio, ke estas malfacile anticipi ion scii pri tiaj aferoj. Unu diris: "Jen, en mia mano estas buko, kaj se mi, perdinte la kapon, ion scias, mi ĝin penetros en la teron." Thorkel venis al li; kaj post la hako la buko tuj falis el la mano. Post tio restis du, antaŭ ol venis Thorkel al mi.

Sigurd Buesson ridetis al la aŭskultantoj, kiuj sidis silentaj kaj streĉitaj, kaj levis sian bierkruĉon kaj profunde trinkis. Diris reĝo Harald:

—Mi vidas, ke restas al vi la kapo, kaj la klukado pravas, ke senmanka estas via gorgo; sed el via situacio sur la trunko estas malfacile konjekti, kiel vi povis savi tiu-



jn du, kian ajn longon havis viaj haroj. Ĉi tiun rakonton mi nomas bona, kaj ne plu atendigu nin pri la fino.

Ĉiuj opiniis kiel reĝo Harald, kaj Sigurd Buesson daŭrigis:

—Kiam mi sidis tie sur la trunko, mi ne timis pli ol la aliaj, mi pensas; sed ŝajnis al mi ĉagrene morti ne farinte ion rakontindan. Tial mi diris al Thorkel, kiam li venis: "Mi havas zorgon pri miaj haroj kaj ne volas, ke sango makulu ilin." Tion dirante mi ilin ŝovis antaŭen super la kapon; kaj viro, kiu paŝis malantaŭ Thorkel — oni poste diris al mi, ke estis lia bofrato — venis antaŭen kaj volvis miajn harojn ĉirkaŭ siaj manoj kaj diris al Thorkel: "Nun frapu!" Tion li faris; kaj en tiu momento mi altiris al mi la kapon laŭkapable rapide, tiel ke la hakilo trafis inter mi kaj la bofrato kaj dehakis ambaŭ liajn manojn. Unu restis pendanta en miaj haroj.

Ĉiuj en la halo brue ekridis, kaj Sigurd mem ridis kaj daŭrigis:

—Jes, vi ridu; sed vi ne povas ridi tiom, kiom la norvegoj ridis, kiam ili vidis la bofraton de Thorkel ruliĝi sur la grundo kaj Thorkel prigapadi lin; iuj falis pro rido. Jarlo Erik alpaŝis min kaj diris: "Kiu vi estas?" Mi diris: "Sigurd mi nomiĝas, kaj Bue estis mia patro; kaj ne mortis ankoraŭ ĉiuj Jomsvikingoj." La jarlo diris: " Mi rimarkas, ke vi estas parenco de Bue; ĉu vi volas akcepti vian

vivon de mi?” ”De viro kiel vi mi ĝin akceptas,” mi respondis. Kaj mi estis malligita de la ŝnuro. Sed Thorkel tion malŝatis kaj kriis: ”Ĉu nun komenciĝu tiaj aferoj? Tiakaze mi prefere ne prokrastu la aferon de Vagn.” Tion dirante, li levis la hakilon kaj kuris kontraŭ lin, kiu sidis ĉe la fino de la trunko. Sed unu el la ŝipanoj de Vagn, Skarde, sidis kvara antaŭ Vagn; kaj ŝajnis al li maljuste, ke Vagn estu hakita antaŭ sia ordo en vico. Tial li sin ĵetis antaŭen, kiam Thorkel preterkuris, kaj Thorkel falis antaŭen super li, rekte antaŭ Vagn. Vagn sin klinis kaj kaptis la hakilon; kaj nenia laco estis rimarkebla ĉe li, kiam li hakis ĝin en la kapon de Thorkel. ”Jen la duono de la promeso,” diris Vagn; ”kaj ne mortis ankoraŭ ĉiuj Jomsvikingoj.” Nun la norvegoj ridis eĉ pli ol ĵus; kaj Erik Jarlo diris: ”Ĉu vi volas akcepti vian vivon, Vagn?” ”Mi volas,” diris Vagn, ”se tio validos por ni ĉiuj.” ”Tiel estu,” diris la jarlo; kaj ĉiuj estis malligitaj. Dek du ni estis, kiuj vivaj forlasis la trunkon.

Sigurd Buesson multan laŭdon ricevis pro sia rakonto, kaj ĉiuj laŭdis lian manieron utiligi siajn harojn. Leviĝis nun multe da konversacio ĉirkaŭ la tabloj pri tio, kion li rakontis kaj pri lia propra bonŝanco kaj pri tiu de Vagn; kaj Orm diris al Sigurd:

—Multo, kion ĉiuj aliaj scias, estas nekonata por mi kaj Toke, ĉar ni estis ekster la lando dum tiom longa tempo. Kie nun estas Vagn, kaj kio okazis al li post tiam,

kiam li sin savis de la trunko? El via rakonto ŝajnas al mi, ke lia bonŝanco estas pli favora ol ies, pri kiu mi aŭdis.

—Verŝajne vi prave prijuĝas, respondis Sigurd, kaj ne duonvoje haltas lia bonŝanco. Li ĝuis abundan favoron de Erik Jarlo, kaj post kelka tempo li vizitis la filinon de Thorkel Leira kaj ŝin trovis pli bela ol li kredis; kaj ŝi ne malvolis lin helpi plenumi la restantan duonon de la promeso, kaj nun ili estas geedzoj kaj ĝuas komforton. Li planas iri kun ŝi al Bornholmo, tuj kiam permesos tempo; sed kiam laste iu aŭdis pri li, li ankoraŭ restadis en Norvegujo kaj plendis pri tio, ke ankoraŭ ne eblas al li foriri de tie. Ĉar tiom da bienoj li ricevis kun la knabino kaj tiom da moveblaj proprajoj, ke ne eblas ĉion rapide vendi kontraŭ altaj prezoj; kaj al Vagn ne estas kutimo, ke li sen neceso vendas malkare.

—Estas en via rakonto unu afero, al kiu mi ne povas ne fiksi la pensojn, diris Toke al Sigurd; kaj ĝi estas la trezorkesto de via patro Bue, kiun li prenis kun si en la maron. Ĉu vi sukcesis ĝin suprenlevi antaŭ ol vi forlasis Norvegujon, aŭ ĉu iu alia ĝin levis? Se ĝi ankoraŭ kuŝas sur la marfundo, mi scias, kion fari, se venos mi al Norvegujo: mi serĉus per graplo la keston; ĉar la arĝento de Bue valorus la penon.

—Tre serĉadis tiun keston, diris Sigurd, kaj la norvegoj kaj ni, kiuj restis post Bue. Multaj graploserĉis per alhokiloj el fero, sed nenio alkroĉiĝis; kaj viro de Viken

plonĝis kun ŝnuro kaj ne estis plu vidata. Post tio ĉiuj kredis, ke Bue estas potenca reteni sian keston tie mal-supre kaj forte ekpreni tiujn, kiuj provas ĝin tuŝi. Ĉar li estis viro tre forta kaj tre domaĝis sian arĝenton. Kaj sci-antaj homoj akordas pri tio, ke la forto de tiuj, kiuj loĝas en teraj tombaltaĵoj, estas pli granda ol tiu de la vivan-toj; kaj tio povas validi ankaŭ por Bue malgraŭ tio, ke li ne sidas en tombaltaĵo, sed sur la marfundo apud sia kesto.

—Domaĝe pri la arĝento, diris Toke; sed tio estas vero, ke eĉ la plej brava viro povus deziri al si ĉion alian pre-fero ol senti ĉirkaŭ si la brakojn de Bue Dika sub la akvo.

Per tio tiu vespero finiĝis; kaj en la sekvanta vespero reĝo Harald deziris aŭdi pri la aventuroj de Styrbjörn inter vendoj kaj kuroj. Styrbjörn diris, ke li mem ne es-tas kompetenta rakontanto; sed islandano en lia akom-panantaro ekparolis. Li nomiĝis Björn Åsbrandsson kaj estis fama batalulo kaj ankaŭ granda poeto samkiel ĉiuj voĝantaj viroj de Islando; kaj malgraŭ tio, ke li nun estis iom ebria, li komence kun granda lerteco eldiris versojn al reĝo Harald en metro nomata toeglago. Ĝi estis la plej moderna kaj plej malfacila versmetro ĉe is-landaj poetoj, kaj la versoj estis tiel arte kompilitaj, ke malmulto estis komprenebla el ilia enhavo. Ĉiuj aŭskul-tis kun saĝa mieno, ĉar nekompreno de poezio donis malbonan reputacion; kaj reĝo Harald laŭdis la versojn

kaj donis al la poeto oran ringon. Toke sin apogis kontraŭ la tablo kun la kapo sur la manoj kaj suspiris; li malgaje murmuris, ke tio estas vera poeteco; kaj nun li komprenas, li diris, ke li mem neniam kapablos fari versojn tiaspecajn, kiuj alportas orajn ringojn.

La viro de Islando, kiun iuj nomis Björn Bredvikingakappe, kaj kiu pasigis du somerojn kun Styrbjörn, post tio daŭrigis rakontante pri la militiroj de Styrbjörn kaj rimarkindaj aferoj, kiuj dum tiuj okazis; bone kaj longe li parolis sen tio, ke iu enuiĝis aŭskulti; kaj ĉiuj sciis, ke tio, kion li rakontas, estas vero, ĉar Styrbjörn mem aŭskultis. Multon li povis diri pri bravaj entreprenoj kaj pri la granda bonŝanco de Styrbjörn kaj ankaŭ pri riĉaĵoj, kiujn akiris liaj ŝipanoj. Li metis finon al sia rakonto eldirante malnovan poemon pri la prapatroj de Styrbjörn, ekde la dioj ĝis lia onklo Erik, kiu nun sidis en Upsalo; kaj la lastan strofon li mem aldonis:

*For al nord'  
hered-eltordi  
Styrbjörn cent  
kilfortojn remas;  
bravaj viroj  
venkoravaj  
lordos tuj  
sur Erik-bordoj.*

Per laŭta jubilo oni salutis tion; kaj multaj eksaltis de siaj sidlokoj kaj tostis por la bonŝanco de Styrbjörn. Styrbjörn alvenigis multekostan trinkpokalon kaj ĝin donis al la poeto kaj diris:

—Ĉi tio ne estas plena poetrekompenco por vi; pli vi ricevos, kiam mi sidos en Upsalo. Tie estos bona rekompenco al ĉiu, kiu min akompanos, ĉar mia onklo Erik estas ŝparema homo, kiu multon staplis, kio povos fariĝi utila. Printempe mi iros tien por malfermi liajn kestojn, kaj kiuj volas partopreni, tiujn mi bonvenigas.

Inter la viroj de reĝo Harald kaj de reĝo Sven sin trovis multaj, kiuj sentis ekscitiĝon pro tio kaj tuj kriis, ke ili volas partopreni; ĉar famo ĉirkaŭis la riĉaĵon de reĝo Erik, kaj neniam post la epoko de Ivar Vidfamne Upsalo estis prirabita. Jarlo Sibbe de la Malgrandinsuloj estis ebria, kaj estis malfacile al li regi la stiradon de siaj kapo kaj bierkruĉo; sed li tamen per laŭta voĉo kriis, ke li intencas akompani Styrbjörn kun kvin ŝipoj; ĉar li nun komencis sin senti laca kaj ne tute sana, kaj estus pli bone morti inter bataluloj ol kiel bovino sur pajlo. Reĝo Harald diris, ke li siaparte estas tro maljuna por milit-ekskursi; kaj siajn proprajn virojn li bezonas hejme por regi maltrankvilulojn; sed li nenion kontraŭdiros, li diris, se Sven volas helpi al Styrbjörn per ŝipoj kaj ŝipanoj.

Reĝo Sven kraĉis pensmiene kaj trinkis gluton kaj ludis per sia barbo kaj diris, ke al li estas maloportune

malhavi siajn ŝipojn kaj ŝipanojn, ĉar ĉiuj el ili estos bone uzataj kontraŭ saksoj kaj obotritoj.

—Ŝajnas al mi plej akcepteble, li diris, ke mia patro donu tiun helpon; ĉar nun, kiam li estas maljuna, liaj viroj havas malmultan okupon krom sin adapti al manĝohoroj kaj aŭskulti pastran babilaĉon.

Kolero kaptis reĝon Harald ĉe tiu parolo, tiel ke granda malkvieto leviĝis en la halo, kaj diris la reĝo, ke li facile komprenas, ke Sven volas, ke li sidu sen armiloj en la lando.

—Sed nun estos tiel, kiel diras mi, li kriis kaj lia vizaĝo estis tre ruĝa; ĉar mi kaj neniu alia estas dana reĝo; kaj vi, Sven, donos al Styrbjörn ŝipojn kaj ŝipanojn.

Reĝo Sven sidis silenta, ĉar li havis timon pro la kolero de sia patro; kaj oni povis rimarki, ke multaj el liaj viroj deziras kuniri al Upsalo. Tiam Styrbjörn diris:

—Min ĝojigas vidi, ke vi ambaŭ havas fervoron havigi al mi helpon; kaj por mi estos plej avantaĝe ke vi, Harald, decidu, kion sendu Sven, kaj ke vi, Sven, diru, kioman helpon donu via patro.

Ĉe tio multaj ekridis kaj la konkordo ree pliboniĝis; kaj fine estis decidite, ke Harald kaj Sven asistu al Styrbjörn per po dek du ŝipoj, bone ekipitaj, krom la ŝipoj kaj ŝipanoj, kiujn li povos ricevi de la skanioj; kaj kompense Harald kaj Sven havu parton de la trezoroj de Erik. Kaj per tio finiĝis tiu vespero.

En la sekvanta tago la julolardo estis jam elĉerpita; anstataŭe brasiksupo kaj ŝafoviando estis metitaj sur la tabloj, kaj ĉiuj trovis tion bongusta ŝanĝo. En tiu vespero viro de Halland rakontis pri granda geedziĝo, kiun li partoprenis en Finnveden ĉe la sovaĝaj smolandanoj. Tie leviĝis malkonkordo pri ĉevalnegoco, kaj rapide enmaniĝis la tranĉiloj; kaj la ekedzino kaj la fraŭlinoj ridis kaj aplaŭdis per la manoj kaj kuraĝigis la kverelantojn. Sed kiam la edzino, kiu devenis de bonreputacia familio, vidis unu el la parencoj de la edzo elpremi okulon de ŝia onklo, ŝi kaptis al si torĉon de la muro kaj frapis per ĝi la edzon sur la kapon, tiel ke ekbrulis liaj haroj; kaj rimedkonscia fraŭlino sian jupon volvis ĉirkaŭ lian kapon kaj forte ĝin alpremis kaj tiel savis lian vivon, kvankam li multe kriis kaj estis bruliĝinta nigra kaj kalva, kiam li ree montris la kapon. El tio venis fajro en la plankopajlon; kaj dek unu ebriaj kaj vunditaj mortis en la flamoj; tiel ke tiu geedziĝo ĉe ĉiuj homoj en Finnveden posedis la reputacion, ke ĝi estis plenvalida grandgeedziĝofesto, pri kiu indas paroli. Kaj la edzino nun feliĉe vivas kun sia edzo, kvankam novajn harojn anstataŭ la brulintaj li ne ricevis.

Kiam finiĝis ĉi tiu rakonto, reĝo Harald diris, ke li ŝatas aŭdi tiajn gajajn aferojn pri la vivado de la smolandanoj, kiuj laŭ naturo estas friponoj kaj perfortuloj; kaj episkopo Poppo devas danki al Dio kiel eble plej ofte, li



diris, ke li venis al decaj homoj en Danlando kaj ne al la malica rabistaro en Finnveden aŭ Värend.

—Kaj nun, reĝo Harald daŭrigis, mi volas, ke ni morgaŭ aŭdu pri la lando de la andaluzoj kaj pri ĉio rimarkinda, kio okazis al Orm Tostesson kaj Toke Grågullsson dum ilia vojaĝo; ĉar mi pensas, ke tio povos esti plezuro por ni ĉiuj.

Per tio finiĝis tiu vespero; kaj en la sekvanta mateno Orm kaj Toke konsiliĝis pri tio, kiu rakontu.

—Vi estas nia ĉefulo, diris Toke; kaj tial vi parolu.

—Vi partoprenis antaŭ ol mi aliĝis al la vojaĝo, diris Orm; kaj vi estas pli babilema ol mi; kaj jam urĝas, ke vi parolu ĝissate; ĉar ŝajnis al mi, ke foje dum ĉi tiuj vesperoj estas al vi malfacile silenti, dum aliaj rakontas.

—Paroli mi ne timas, diris Toke; kaj mi kredas, ke mia lango estas same eltenema kiel tiu de la pli multaj. Sed tamen sin trovas en tiu afero malfacilaĵo por mi. Mi ne povas paroli ne trinkante multe da biero, ĉar sekeco ekestas en mia gorgo; kaj ĉi tiu rakonto estos longa. Kvar vesperojn jam mi estis sukcesa, tiel ke neebria kaj pacema mi forlasis la tablon de la reĝo, kaj tamen estis malfacile malgraŭ tio, ke ne multe mi parolis. Kaj estus malbone, se mi nun falus en malbonhumoron kaj ricevus reputacion pri malbona konduto, kiam mi sidas ĉe tablo de reĝoj.

—Ni havu esperon, diris Orm; kaj eĉ se vi fariĝos ebria ĉe la rakontado, vi apenaŭ povos fariĝi malbonhumora kaj batalema pro tiel bona biero.

—Estu, kiel estos, diris Toke kun dubo kaj skuis la kapon.

En tiu vespero Toke rakontis pri la ekspedicio de Krok kaj ĉion pri ĝi: kiel Orm enŝipiĝis, kaj kiel ili trovis la judon en la maro kaj pri la granda pirabo de la fortikaĵo en la regno de Ramiro; kaj post tio pri la batalo kontraŭ la andaluzoj kaj kiel ili malbonfartis kiel remsklavoj kaj pri la morto de Krok. Post tio li rakontis, kiel ili liberiĝis de la remado kaj pri la amikeco de la judo kaj kiel ili ricevis siajn glavojn de Subaida.

Kiam li venis al tiu punkto, reĝo Harald kaj Styrbjörn volis vidi la glavojn; kaj Orm kaj Toke pasigis Blulango kaj Ruĝbekon laŭlonge de la tablo. Reĝo Harald kaj Styrbjörn ilin elingigis kaj pesis per mano kaj zorge ilin ekzamenis; kaj ambaŭ tenis la opinion, ke ili neniam vidis pli bonajn glavojn. Post tio la glavoj pasis ĉirkaŭ la tablo, ĉar multaj scivolemis pri tiaj armiloj; kaj Orm sidis maltrankvila, ĝis ili revenis, ĉar li sin sentis soleca kaj duone nuda sen Blulango.

Oblikve kontraŭ Orm kaj Toke sidis du fratoj, kiuj nomiĝis Sigtrygg kaj Dyre kaj apartenis al la sekvantaro de reĝo Sven; Sigtrygg estis prubatalulo en la ŝipo de reĝo Sven mem. Li estis granda kaj fortika kaj portis lar-

ĝan kaj senbride kreskintan barbon, kiu atingis ĝis liaj okuloj. Dyre, lia frato, estis pli juna, kaj ankaŭ li estis konsiderata unu el la plej bravaj viroj de reĝo Sven. Orm rimarkis, ke Sigtrygg de post kelka tempo rigardis malice lin kaj Toke, kaj kiam nun la glavoj venis al li, li zorge ilin ekzamenis kaj kapklinis kaj aspektis, kvazaŭ estus por li malfacile ilin transdoni.

Reĝo Sven, kiu ŝatis aŭskulti rakontojn pri foraj landoj, nun instigis Toke daŭrigi; kaj Toke, kiu diligente ĝuis bieron dum sia ripozpaŭzo, diris, ke li estas preta daŭrigi, tuj kiam la viroj kontraŭ li ĉesos prigapi lian glavon kaj tiun de Orm. Tiam Sigtrygg kaj Dyre transdonis la glavojn, nenion dirante, kaj Toke rekomencis sian rakonton.

Li nun rakontis pri Almansur kaj ties potenco kaj riĉaĵoj, kiel ili ekservis en lia gvardio kaj devis partopreni la adoradon de lia Profeto per sinklinoj kaj abnegacioj kaj pri la militiroj, kiujn ili partoprenis, kaj pri la predo, kiun ili akiris. Li venis al ilia marŝo tra la Malplena Lando kontraŭ la tombon de Sankta Jakobo kaj rakontis, kiel Orm savis la vivon de Almansur kaj ricevis danke la grandan orĉenon. Tiam reĝo Harald diris:

—Se vi ankoraŭ posedas tiun ĉenon, Orm, mi tre deziras, ke vi ĝin montru; ĉar se ĝi estas same bonkvalita inter kostajoj kiel viaj glavoj inter armiloj, tiam ĝi estas vidinda.

—Mi ankoraŭ ĝin posedas, respondis Orm, kaj intencas ĝin posedi ĉiam; kaj ĉiam ŝajnis al mi plej saĝe ĝin kiel eble malplej montri; ĉar sufiĉe bona ĝi estas por veki deziron ĉe ĉiuj krom reĝoj kaj plej altrangaj granduloj. Sed estus malbonkondukte, se mi rifuzus ĝin montri al vi, reĝa mastro, kaj al reĝo Sven kaj al reĝo Styrbjörn kaj al la jarloj; sed estus bone, se vi ne pasigus ĝin al la aliaj.

Ĉe tiuj vortoj Orm malligis sian vestaĵon kaj elprenis la ĉenon, kiun li portis ĉirkaŭ sia kolo, kaj ĝin transdonis al Hallbjörn stalisto, kiu sidis dekstre de li; Hallbjörn ĝin etendis trans la loko de episkopo Poppo al reĝo Harald; ĉar la loko de la episkopo estis malplena, ĉar li malfortiĝis pro la juldrinkado kaj kuŝis en lito flegata de frato Willibald.

Reĝo Harald ekzamenis la ĉenon kaj ĝin levis kontraŭ la lumon por pli bone vidi ĝian belecon. Li diris, ke dum sia tuta vivo li kolektis juvelojn kaj kostaĵojn kaj ke li tamen ne vidis ion pli belan ol ĉi tiun. La ĉeno konsistis el dikaj platoj el pura oro; ĉiu plato havis longon de pli ol unu colo kaj larĝon de poleksungo meze, kie ĝi estis plej larĝa, kaj estis malpli larĝa ĉe la finoj; tie estis ringetoj, kiuj ĝin fiksis al proksimaj platoj. Kune la ĉeno konsistis el tridek ses platoj, kaj ĉiu dua havis sur sia mezo ruĝan juvelŝtonon, kaj la aliaj havis verdan.

Kiam Styrbjörn ricevis la ĉenon en sian manon, li diris, ke ĝi vere estas forĝaĵo de Vaulunder, sed ke li kre-

das, ke same belaj ornamaĵoj troviĝas en la kestoj de lia onklo; kaj reĝo Sven opiniis, kiam ĝi venis al li, ke ĝi estas trezoro tia, por kiu batalulo volonte verŝus sian sangon, kaj reĝofilinoj fordonus sian virgecon.

Post kiam Thorkel Höge ekzamenis la ĉenon kaj ĝin laŭdis kiel la aliaj, li ĝin etendis diagonale trans la tablo al Orm. Tiam Sigtrygg sin klinis antaŭen kaj provis ĝin pinĉi, sed Orm estis pli rapida kaj ĝin altiris al si.

—Kion vi provas? li diris al Sigtrygg. Mi ne aŭdis, ke vi estas reĝo nek jarlo, kaj aliaj ĝin ne fingrumu.

—Mi volas batali kontraŭ vi pri la ornamaĵo, diris Sigtrygg.

—Povas esti, ke vi volas, diris Orm; ĉar vi ŝajnas al mi avida homo sen prudento. Sed mia konsilo estas, ke vi tiru viajn fingrojn al vi kaj lasu prudentajn homojn en paco.

—Vi timas lukti kun mi, kriis Sigtrygg; sed vi luktu, aŭ transdonu la ĉenon; ĉar mi havas kverelkaŭzon kontraŭ vi jam de longe, kaj la ĉenon mi postulas kiel rekompenco.

—Devas esti, ke vi malbone toleras bieron, tiel ke vi parolas en deliro, diris Orm; ĉar neniam mi vin vidis antaŭ ĉi tiu festeno, kaj tial ne eblas, ke vi havas kverelkaŭzon kontraŭ mi. Kaj nun, li daŭrigis kun komenciĝanta malpacienco, vi agas plej saĝe, se vi sidas silenta kaj vin tenas kvieta, antaŭ ol mi petas permeson de reĝo Harald

tordi al vi la nazon. Mi estas pacemulo, kaj ne volonte tuŝas tian nazon kiel la vian; sed ŝajnas al mi, ke vi bezonas riproĉon eĉ de la plej tolerema persono.

Sigtrygg estis grandega batalulo, timata pro siaj forto kaj perfortemo, kaj ne kutimis al tia alparolo. Li eksaltis de la benko kaj blekis kiel bovo kaj kriis insultojn; sed eĉ pli potence sonis la voĉo de reĝo Harald, kiam li kolera ordonis trankvilon kaj demandis, kio kaŭzas la tumulton.

—Ĉi tiu viro, reĝa mastro, diris Orm, freneziĝis pro via bongusta biero kaj sia propra avido; ĉar li krias pro mia ĉeno kaj diras, ke li havas kverelkaŭzon kontraŭ mi, malgraŭ tio, ke mi lin neniam vidis.

Reĝo Harald plendis, ke ĉiam la viroj de Sven kaŭzas ĝenojn, kaj per severa voĉo li demandis Sigtrygg, kial li ne prudente povas sin regi, post kiam li tamen aŭdis, ke la paco kaj de Kristo kaj de reĝo Harald regu en la halo.

—Reĝa mastro, diris Sigtrygg, mi diros kiel ĉio estas, kaj vi trovos, ke mia rajto havas bazon. Antaŭ sep jaroj mi suferis damaĝon, kaj nun mi aŭdis, ke ĉi tiuj du personoj parte kaŭzis ĝin. En tiu somero mi hejmenvojis de la sudlandoj kun kvar ŝipoj, Bork Hvenske kaj Silverpalle kaj Faravid Svensson kaj mi; ni tiam renkontis tri ŝipojn kaj parolis kun ili, kaj el la rakonto de Toke mi nun scias, kiuj estis la ŝipoj. Kaj en mia ŝipo estis sklavo de Hispanujo, nigrahara kaj flavhaŭta; li saltis en la maron

dum la interparolo kaj prenis kun si mian bofraton Oskel, bravan viron, kaj ni ne vidis ilin poste. Kaj nun ni ĉiuj aŭdis, ke tiu sklavo enŝipiĝis ĉe ili kaj estis tiu, kiun ili nomas judo Salaman, kaj kiu estis al ili utila. Tiuj du, kiuj nun sidas ĉi tie, Orm kaj Toke, lin tiris el la maro; ni tion aŭdis el la buŝo de unu el ili. Tia sklavo povus doni al mi grandan profiton; kaj tiu Orm nun estas ĉefulo super tiuj, kiuj estis en la ŝipo de Krok kaj ankoraŭ vivas, kaj tial estas juste, ke li kompensu min pro la damaĝo, kiun mi suferis. Tial mi postulas de vi, Orm, ke vi donu al mi la ĉenon kiel kompensaĵon pro la sklavo kaj mia bofrato, egale ĉu vi donos ĝin propravole al mi aŭ ĉu vi min renkontos por lukto ekstere, sur platigita grundo, kun ŝildo kaj glavo, nun tuj. Vin mortigi mi ĉiukaze devas, post kiam vi diris, ke vi volas tordi mian nazon; ĉar al mi, Sigtrygg, filo de Stigand, prubatalulo de reĝo Sven, neniu diris insultajn vortojn kaj poste vivis ĝis la fino de la tago.

—Du aferoj min konsolas, kiam mi aŭdas vin paroli, diris Orm. Unu estas, ke la ĉeno apartenas al mi kaj ankaŭ apartenos, egale kiu ajn saltis en la maron el via ŝipo antaŭ sep jaroj. La dua estas, ke ankaŭ mi kaj Blulango havas ian influon al tio, ĉu vi aŭ mi vivos pli longe. Sed nun ni komence aŭskultu, kion diras reĝo Harald pri ĉi tio.

Ĉiuj en la halo ĝojis pro tio, ke sin prezentas ebleco de interlukto; ĉar lukto inter du tiaj viroj, kiaj Orm kaj Sigtrygg, estos certe vidinda. Reĝo Sven kaj Styrbjörn esprimis, ke tio estos bonvena interrompo en la juldrinkado; sed reĝo Harald sidis pensema karesante la barbon kaj aspektis hezitema. Fine li diris:

—Malfacile estas juĝi juste en tio ĉi; kaj al mi ne aperas certe, ke Sigtrygg rajte povas postuli kompensaĵon de Orm pro damaĝo ne kaŭzita de Orm. Sed estas vero, ke neniu volas perdi bonan sklavon kaj bofraton ne dezirante eblecon postuli kompensaĵon pro tia damaĝo. Kaj nun, post interŝanĝo de insultoj, estos en ĉiu kazo batalo inter ĉi tiuj du, tuj kiam ili estos ekster mia vido; kaj tia ĉeno, kiun Orm portas, certe jam multajn murdojn kaŭzis kaj tre verŝajne kaŭzos pliajn. Tial estas same bone, ke ili luktu tie ĉi, plezure por ni ĉiuj; kaj vi, Hallbjörn, zorgu pri tio, ke luktospaco ekstere estu ebenigita kaj markita, kie estas plej plata la grundo. Kaj dismetu torĉojn ĉirkaŭe kaj anoncu, kiam ĉio estas preta.

—Reĝa mastro, diris Orm per ĉagrena voĉo, tian du-elon mi ne volas partopreni.

Ĉiuj lin rigardis, kaj Sigtrygg kaj multaj el la sekvan-  
toj de reĝo Sven ridis. Reĝo Harald skuis la kapon kaj  
diris:



—Se vi timas lukton, mi alian eblecon ne vidas ol tiun, ke vi transdonu al li la ĉenon, ĉu utile aŭ ne por vi. Ŝajnis al mi, ke ĵus vi pli kuraĝe parolis.

—Ne pri la lukto mi pensas, diris Orm, sed pri la malvarmo. Ĉiam mi havis delikatan sanon, kaj malvarmon mi malplej toleras; kaj nenio por mi estas pli danĝera ol de varmo kaj biero iri al vespera malvarmo, precipe nun, kiam mi longe estis en la sudaj landoj kaj ne havas kutimon je vintra malvarmo. Kaj ne estas juste, ke mi pro tiu Sigtrygg suferu tusadon dum la resto de la vintro; ĉar tusado ordinaro dum longa tempo sin kroĉas al mi, kaj ofte mia patrino diris, ke tusado kaj reŭmatismo kaŭzos mian morton, se ne mi min zorge gardos. Kaj se mi rajtus decidi, reĝa mastro, mi juĝus preferinde, ke la lukto okazu ĉi tie en la domo, antaŭ via tablo, kie estas sufiĉa spaco. Kaj tiel vi mem povus vidi la lukton sen ĉia ĝeno.

Multaj ridis pro la timo de Orm; sed Sigtrygg ne plu ridis, sed furioze kriis, ke li nuligos ĉiujn ĉagrenojn de Orm pri tusado. Sed Orm ne atentis pri li, sed sidis turniĝinta al reĝo Harald atendente lian decidon. Reĝo Harald diris:

—Estas ĉagrene, ke la junuloj komencas febliĝi kaj ne plu estas tiaj, kiaj en pasinta tempo. La filoj de Lodbrok ne pensis pri sano kaj vetero, kaj ankaŭ mi ne dum mia juneco; sed inter junuloj mi konas preskaŭ neniun krom

Styrbjörn, kiu estas laŭ nia speco. Sed estas vero, ke nun je mia aĝo estas preferinde por mi rigardi la lukton de mia sidloko. Kaj bone estas, ke la episkopo estas en sia lito, ĉar li oponus tion ĉi. Sed laŭ mia penso la paco en la halo ne estos rompita de tio, kion mi mem permesas; kaj mi ne kredas, ke Kriston ofendos duelo, se ni ĉion aranĝos laŭ leĝo kaj moro. Tial Orm kaj Sigtrygg luktu tie ĉi en la ĉambro antaŭ mia tablo per glavo kaj ŝildo, helmo kaj maŝkiraso; kaj neniu donu al ili asiston en io alia ol en la sinvestado per la bataalkostumo. Kaj se unu mortos, ĉio estas bona; sed se unu ne plu kapablos stari sur siaj piedoj, aŭ forĵetos sian glavon aŭ fuĝos ĝis sub la tabloj, li ne plu estu atakata de la alia; sed la lukton li en tiu kazo malgajnis kaj kun ĝi la ĉenon. Kaj mi kaj Styrbjörn kaj Hallbjörn ĉefstalisto zorgos, ke ĉio okazu juste.

Nun viroj iris alporti la bataalkostumojn al Orm kaj Sigtrygg; kaj granda bruoj okazis en la halo, kaj multaj vokis unu al aliaj. La viroj de reĝo Harald juĝis Orm pli bona el la du; sed la viroj de reĝo Sven laŭdis Sigtrygg kaj diris, ke li faligis naŭ kontraŭulojn en dueloj, ricevante mem eĉ ne unu vundon bezonanta bandaĝon. Inter la plej parolemaj estis Dyre; li demandis Orm, ĉu li timas tusi en la tombo, kaj poste li sin turnis al sia frato kaj petis lin kontentiĝi ricevante mem la ĉenon kaj doni al li, Dyre, la glavon de Orm.

Post kiam okazis la interrompo en lia rakontado, Toke sidis melankolia kaj murmuris por si kaj drinkis; sed kiam li aŭdis la vortojn de Dyre, vivo vekigis en li. Sian manĝotranĉilon li hakis en la tablotabulon antaŭ Dyre tiel forte, ke ĝi restis staranta profunde en la ligno, kaj ĵetis sian glavon, ankoraŭ en sia ingo, apud la tranĉilon; post tio li sin ĵetis trans la tablon tiel rapide, ke al Dyre ne restis tempo sin forklini, kaj kaptis lin je la oreloj kaj je la vangobarbo kaj premis lian vizaĝon malsupren kontraŭ la armilojn kaj diris:

—Jen vi vidas armilojn same bonajn kiel tiuj de Orm; sed ilin vi akiru mem, se vi ilin deziras; ne petu almoze de alia.

Dyre estis forta viro, kaj li metis siajn manojn ĉirkaŭ la manartikojn de Toke kaj forte tiris; sed tio kaŭzis dolorojn en barbo kaj oreloj, kaj li ĝemis kaj ne povis sin liberigi.

—Jen mi vin tenas en interparolo tre amika, diris Toke; ĉar la reĝan pacon ĉi tie mi ne volas ĝeni. Sed mi ne lasos vin, antaŭ ol vi promesos lukti kontraŭ mi; ĉar en senokupo Ruĝbeko ne trovas komforton, kiam ŝia fratino sin okupas.

—Lasu min, diris Dyre kun la buŝo premata al la tablo, mi vin mortigos, tuj kiam mi vin atingos.

—Nun vi promesis, diris Toke; ĉe tiuj vortoj li lin lasis kaj forblovis de siaj manplatoj iom da barbo, kiu mal-fiksiĝis.

La oreloj de Dyre estis ruĝaj, sed cetere li estis blanka pro furiozo kaj komence aspektis kvazaŭ malkapabla paroli. Li sin levis kaj diris:

—Ĉi tion mi reguligos kun vi tuj; kaj tio estas preferinda, ĉar tiel mi kaj mia frato ricevos po unu el la hispanaj glavoj. Ni iru pisi kune ne forgesante kunporti la glavojn.

—Ĝuste vi parolis, diris Toke, ĉar inter ni solenaĵoj ne estas bezonataj. Kaj pro tio mi estos al vi danka tiel longe, kiel vi vivos; kaj kiel longe, tion ni vidos.

Ili iris ambaŭ laŭ sia flanko de la reĝa tablo kaj post tio ŝultro ĉe ŝultro laŭ la irejo malantaŭ la perpendiklaj tabloj kaj eksteren tra unu el la pordoj en la gabla domoflanko. Reĝo Sven ilin rigardis kaj ridetis; ĉar li ŝatis, ke liaj subuloj aldonu al sia famo kaj al timego, kiun ili devastigis.

Nun Orm kaj Sigtrygg sin vestis por lukto; kaj la plankon oni balais, kie ili luktos, tiel ke ili ne stumblu en la pajlo aŭ super ostoj ĵetitaj al la hundoj de reĝo Harald. La viroj en ambaŭ ekstremoj de la halo sin interpuŝis ĝis kie ili vidos pli bone kaj stariĝadis dense sur benkoj kaj transversaj tabloj ambaŭflanke de la malplena spaco kaj malantaŭ la tablo de reĝo Harald kaj laŭ la muro de la

kvara domoflanko. Reĝo Harald nun montris plej gajan humoron kaj havis fervoron vidi la batalon; kaj kiam li hazarde sin turnis kaj vidis iujn el siaj virinoj malfermeti pordon kaj enrigardi, tiam li ordonis, ke liaj virinoj kaj filinoj envenu kaj rigardu; ĉar estus senkompatate, li opiniis, rifuzi al ili tian spektaklon. Li cedis al iuj el ili sidspacon sur la ĉefbenko ĉe sia flanko kaj sur la malplena loko de la episkopo; kaj du el la plej belaj filinoj ricevis sidlokon apud Styrbjörn kaj ne plendis pri manka spaco; ili karesiĝeme ridis, kiam li ilin regalis per biero, kaj ili brave trinkis. Al tiuj virinoj, kiuj ne trovis spacon sur la ĉefbenko, alia benko estis metita malantaŭ la tablo, kie la ĉefbenko ne ĝenis la vidon.

Stalĉefo Hallbjörn ordonis blovadon de korno kaj silenton kaj proklamis, ke neniu moviĝadu dum la lukto kaj ke neniu rajtas kriadi konsilojn al la batalantoj aŭ ĵeti objektojn sur la batalejon. Ambaŭ nun estis pretaj kaj eniris la batalspacon unu kontraŭ la alia; kaj kiam oni vidis Orm teni la glavon en sia maldekstra mano, aŭdiĝis fervora murmurado; ĉar lukto inter dekstramanulo kaj maldekstramanulo estas tre malfacila por ambaŭ, ĉar tiam la hako venas de inversa flanko, kaj la ŝildoj malpli bone ŝirmas.

Ambaŭ aperis kiel bataluloj, kiujn malmultaj renkontus propravole, kaj ĉe neniu el ili estis rimarkebla timo pri la fino. Orm estis duonkapon pli alta ol Sigtrygg kaj

havis pli longajn brakojn; sed Sigtrygg estis pli fortika kaj aspektis pli forta. Ili tenis la ŝirmilojn bone kovrantaj la bruston kaj sufiĉe alte por rapide povi kovri la kolon kaj fiksas la rigardon unu sur la alia por sin teni preta kontraŭ ĉiu atako. Tuj kiam ili interproksimiĝis, Orm atakis kontraŭ la kruroj de Sigtrygg; sed tiu rapide flankensaltis kaj rebatis per frapo, kiu brue trafis la helmon. Post tio ambaŭ fariĝis singardaj kaj kaptis ĉiujn hakojn per la ŝildoj; kaj reĝo Harald klarigis al siaj virinoj, ke estas avantaĝo, kiam spertuloj luktas, ĉar ili ne forgesas pro fervoro sin gardi, kaj pro tio la plezuro daŭras pli longe.

—Antaŭdiri estas malfacile ankaŭ por tiu, kiu multon vidis, kiu ĉi tie venkos, li diris; sed la ruĝulo ŝajnas al mi esti unu el la plej lertaj viroj, kiujn mi vidis, malgraŭ tio, ke li timas malvarmon; kaj povas esti, ke Sven perdos subulon en ĉi tio.

Reĝo Sven, kiu same kiel ambaŭ jarloj eksidis sur tablorando por sidi turnita al la lukto, malestime ridetis kaj diris, ke neniu konanta Sigtrygg bezonas sin ĉagreni pri tio.

—Kaj malgraŭ tio, ke miaj bataluloj ne timas duelojn, li diris, mi malofte iun tiamaniere perdas, krom kiam ili duelas inter si.

Nun Toke revenis. Li lamis kaj oni aŭdis lin murmuri versaĵon; kaj kiam li faris paŝon trans la benko al sia sidloko, fariĝis videble, ke sango fluas de unu femuro.

—Kiel pri Dyre? demandis Sigurd Buesson.

—Li rabis tempon, diris Toke; sed nun li finpisis.

Nun ĉies okuloj sin direktis al la lukto, kies finon Sigtrygg ŝajnis urĝe alstrebi. Li kolere atakis kaj provis trafi la krurojn kaj vizaĝon de Orm kaj la fingrojn de lia glavmano. Orm sin sukcese defendis kontraŭ la hako, sed ŝajnis, ke li mem ne multon faras, kaj rimarkeble la ŝildo de Sigtrygg lin ĝenis. Ĝi estis pli granda ol lia kaj konsistis el rezistema ligno kovrita de alnajlita dika led, kaj nur la meza umbo estis el fero; estus danĝere, se la glavo fiksiĝus en la ŝildrando, ĉar en tiu kazo ĝi povus rompiĝi aŭ esti tordita el la mano. La ŝildo de Orm konsistis tute el fero kaj havis akrepintan pikilon.

Sigtrygg rikanis kontraŭ Orm kaj demandis, ĉu al li estas sufiĉe varme.

Sango fluis sur la vango de Orm post la unua frapo sur la helmo, kaj li ankaŭ estis ricevinta pikon en la kruro kaj tranĉon sur la mano; Sigtrygg ankoraŭ estis nevundita. Orm nenion respondis, sed cedis futon post futo malantaŭen laŭlonge de unu transversa tablo. Sigtrygg kaŭris malantaŭ sia ŝildo kaj sin ĵetis antaŭen kaj flanken kaj atakis ĉiam pli intense, kaj por la plimulto lia venko ŝajnis proksima.

Subite Orm faris salton antaŭen kaj deturnis la hakon de Sigtrygg per la glavo kaj per sia tuta forto puŝis sian ŝildon kontraŭ lian, tiel ke la ŝirmilpikilo penetris tra ledο kaj ligno kaj firme fiksiĝis. Li premegis la ŝildojn suben tiel forte, ke la ŝildoteniloj de ambaŭ rompiĝis, kaj ambaŭ nun retropaŝis kaj ekhavis spacon por ataki per la glavoj, kaj ili samtempe hakis. La hako de Sigtrygg trafis la flankon de Orm kaj faris truon en la maŝkiraso kaj profundan vundon; sed la hako de Orm trafis la kolon; kaj laŭta krio sonis en la halo, kiam la kapo dekoliĝis kaj faris resalteton sur la tablorando kaj falis en la bierbarelon ĉe la ekstremo de la tablo.

Orm ŝanceliĝis kaj sin apogis kontraŭ la tablon; li viŝis la glavon glitigante ĝin sur la genuo kaj ĝin repuŝis en la ingon kaj rigardis la senkapan korpon ĉe siaj piedoj.

—Jen vi vidas, li diris, kies la ĉeno.

**Frans G. Bengtson**

*Ĉapitro el la romano Orm la Ruĝa*

*El la sveda tradukis Bertil Nilsson*

*Eldonita de Eldona Societo Esperanto*

*kaj aĉetebla ĉe la Libroservo de UEA*

*kaj landaj libroservoj*



## La horlo

. . . *8-a de majo*. — Kia bela tago! La tutan matenon mi pasigis kuŝante sur herbo antaŭ mia domo, sub grandega platano, kiu ĝin kovras, ŝirmas kaj ombras tute. Tiun landon mi amas kaj ĝian vivon, ĉar en ĝi mi havas miajn radikojn, tiun profundan kaj delikatan radikaron, kiu ligas la homon kun la tero, kie naskiĝis kaj mortis la prapatroj; kiu ligas al pensoj kaj al manĝaĵoj, al kutimoj kiel al nutraĵoj, al tieaj esprimoj, al la vilaĝanaj tonoj, al la odoroj de tero, de vilaĝoj, de la aero mem.

Mi amas mian domon, kie mi kreskis. De miaj fenestroj mi vidas la Senon fluanta laŭlonge de mia ĝardeno, trans vojo, preskaŭ ĉe mi, la grandan kaj larĝan Senon, iranta de Rueno al Havro, kovrata de preterirantaj ŝipoj.

Tie maldekstre situas Rueno, vasta urbo blutegmenta, sub amaso da pintaj gotikaj sonorilejoj. Ili estas sennombraj, graciaj aŭ larĝaj, superataj de la fandaĵa sagoforma sonorilejo de la ĉefpreĝejo; plenaj de sonoriloj, kiuj sonoras tra blua aero de belaj matenoj, ili ĵetas al mi sian dolĉan malproksiman feran zumon, sian bronзан kan-

ton, kiun al mi portas la vento jen pli laŭte, jen mallaŭte, laŭ ĝia vekiĝo aŭ ekdormo.

Kiel bone estis hodiaŭ matene.

Ĉirkaŭ la dekunua preteriris antaŭ mia kradeĝo longa ŝiparo tirata de trenŝipo dika kiel muŝo, kaj pene ster-toranta per densa fumo.

Post du anglaj goletoj, kies ruĝa flago sulkiĝas sur la ĉielo, iris belega brazila trimasto, tute blanka, mirinde pura kaj brila. Ĝin mi salutis, kial? Mi ne scias, tiel forte min plezurigis ĝia vido.

*12-a de majo.* — Iom da febro mi havas de kelkaj tagoj. Mi sentas min malsaneta, aŭ, pli ĝuste, malgaja.

De kio venas tiuj misteraj influoj, kiuj ŝanĝas nian feliĉon en senkuraĝon kaj nian konfidon en ŝanceliĝon? La aero, nevidebla aero, ŝajnas plena de nekoneblaj Povoĵoj, kies misteran najbarecon ni sentas. Mi vekiĝas plene gaja kun kantoj en la gorĝo. — Kial? — Mi sekvas la fluon de la rivero; kaj subite, post mallonga promeno, mi reiras malĝojega, kvazaŭ malfeliĉo atendus min hejme. — Kial? — Ĉu frosta tremo, tuŝetinte mian haŭton, ŝancelis la nervojn kaj malgajigis la animon? Ĉu la formo de nebuloj aŭ la koloro de la tago, la koloro de objektoj, tiel ofte ŝanĝanta, trairinte okulojn, konfuzis mian penson? Kiu scias? Ĉio nin ĉirkaŭanta, kion ni vidas sen rigardo, atingas sen atento, tuŝetas sen palpo,

renkontas sen distingo, havas al ni, al niaj organoj, kaj tra ili, al niaj ideoj, al nia koro mem, rapidan, mirigan, neklarigeblan efikon.

Kiel profunda ĝi estas, tiu mistero de la nevideblo! Ni ne povas ĝin sondi per niaj mizeraj sentoj, per niaj okuloj, kiuj kapablas vidi nek egaĵon nek etaĵon, nek proksimon nek malproksimon, nek stelajn loĝantojn nek akvogutajn . . . per niaj oreloj, kiuj nin trompas, ĉar ili transdonas aeron vibradon en sonajn notojn. Estas feinoj, kiuj faras tiun miraklon, ke ili tiun movon ŝanĝas en bruon, kaj per tiu metamorfozo naskas muzikon, kiu kantigas la mutan ŝancelon de Naturo . . . per nia flaro, pli malforta ol tiu de hundo . . . per nia gustumo, kiu povas apenaŭ diveni la aĝon de vino!

Ha! Se ni havus aliajn organojn, kiuj farus por ni aliajn miraklojn, kiom da aferoj ni povus ankoraŭ malkovri ĉirkaŭ ni!

*16-a de majo.* — Mi estas malsana tutcerte! Tiel bone mi fartis en lasta monato! Mi havas febron, teruran febron, aŭ pli ĝuste febran malfortecon, kiu igas mian animon tiel suferanta, kiel mian korpon. Senĉese mi havas tiun akran senton, ke minacas danĝero; tiun antaŭtimon, ke malfeliĉo aŭ morto alvenas; tiun antaŭsenton, kiu kredible estas atingo de malsano ankoraŭ nekonata, ĝermanta en la sango, en la karno.

*18-a de majo.* — Mi ĵus petis konsilon de mia kuracisto, ĉar mi ne plu povas dormi. Li trovis la pulson rapida, la okulon larĝa, la nervojn vibrantaj, sed neniun timigan simptonon. Mi devas submetiĝi al duŝoj kaj trinki bromidaĵon.

*25-a de majo.* — Nenia ŝanĝo! Mia farto vere estas stranga. Dum alproksimiĝas vespero, eniras min nekomprenebla sentrankvileco, kvazaŭ la nokto kaŝus al mi teruran minacon. Rapide mi manĝas kaj provas legi; sed mi ne komprenas la vortojn, mi apenaŭ distingas la literojn. Tiam mi paŝas tien reen en mia salono, sub premo de konfuza kaj ne forigebla timo, timo al dormo, timo al la lito.

Ĉirkaŭ la dua, mi aliras mian ĉambron. Ĵus enirinte, mi ŝlosegas kaj enŝovas riglilojn; mi timas . . . kion? . . . Nenion ĝis nun mi timis . . . mi malfermas ŝrankojn, rigardas sub la lito; mi aŭskultas . . . kion? Ĉu ne strange, ke simpla ĝeno, konfuzo de sangirado, eble, incito de nervero, iom da sangalfluo, eta malgranda difekto en la funkciado tiel neperfekta kaj delikata de nia viva maŝino, povas igi melankolia la plej gajan homon, timema la plej bravan? Poste mi kuŝiĝas, kaj atendas dormon, kiel ekzekutiston. Mi atendas ĝin, kun teruro al ĝia veno; kaj batas mia koro, tremetas miaj kruroj, salte-

tas mia tuta korpo en la varmaj littukoj, ĝis mi subite falas en ripozon, kiel oni falas por droni en senmovan akvan faŭkon. Ĝian alvenon mi ne sentas, kiel antaŭe, kiel alvenon de tiu perfida dormo, apude kaŝita, kiu spionas min, kiu tuj min kaptos je la kapo, fermos miajn okulojn, senkonsciigos min.

Mi dormas — longe — du au tri horojn — kaj songo — ne — inkubo min ĉirkaŭprenas. Mi ja sentas, ke mi kuŝas kaj dormas . . . tion mi sentas kaj vidas . . . kaj ankaŭ mi sentas, ke iu alproksimiĝas, min rigardas, palpas, suriras mian liton, genufleksas sur mian bruston, kaptas mian kolon inter siaj manoj kaj premas . . . premas . . . premas plej forte por min sufoki.

Mi min svingas, ligita de tiu akrega senpoveco, kiu paralizas nin en songoj; mi volas krei, — mi ne povas; — mi volas moviĝi, — mi ne povas; — mi provas, per teruraj klopodoj, stertorante, min turni, forĵeti tiun estaĵon, kiu premas kaj sufokas min, — mi ne povas!

Kaj subite mi vekigas, duonfreneza, ŝvitanta.

Mi lumigas kandelon. Sola mi estas.

Post tiu atako, kiu reaperas ĉiunokte, mi fine dormas kviete ĝis tagiĝo.

*2-a de junio.* — Pligraviĝis ankoraŭ mia farto. Kion do mi havas? Neniel efikas la bromido; neniel efikas la duŝbanoj. Ĝus, por lacigi mian korpon, tamen tiel lacan, mi ek-

promenis en arbaron. Unue mi kredis, ke aero freŝa, senpeza, dolĉa, plena de herbaj aŭ foliaj odoroj, verŝos en miajn vejnojn sangon novan, en mian koron novan energion. Grandan ĉasan aleon mi ekiris, poste mallarĝan, inter aroj da arboj senmezure altaj, kiuj metas tegmenton verdan, densan, kvazaŭ nigran, inter la ĉielo kaj mi.

Tremo min ekkaptis subite: ne malvarma, sed stranga korporema tremo.

Mi akcelis la paŝadon, malkvieta pro mia soleco en tiu arbaro, senkaŭze, malsprite timigata de la soleco. Subite ŝajnis, ke oni sekvas min, iu postpaŝas min, kontraŭ mi, kvazaŭ tuŝe.

Mi unumove turnis min. Sola mi estis. Post mi mi vidis nur rektan aleon, malplenan, altan, timige malplenan; kaj antaŭen ankaŭ ĝi etendiĝas senfine, tute same, teruriga.

Mi fermis la okulojn, kial? Kaj ekturnis min sur unu kalkanumo, rapidege, kiel turnludilon. Mi preskaŭ falis, malfermis okulojn; la arboj dancas, la tero sin movas: mi devis sidiĝi. Poste, ha! mi ne plu sciis, de kie mi venis! Stranga ideo! Stranga! Stranga ideo! Mi jam tute ne sciis. Mi ekiris la dekstran flankon kaj alvenis aleon, kiu estis alkondukinta min en arbarmezon.

*3-a de junio.* — Terurega estis tiu nokto. Mi foriros dum kelkaj semajnoj: vojaĝeto, kredeble, min sanigos.

*2-a de julio.* — Rehejmiĝo. Mi saniĝis. Cetere mi faris ĉarman ekskurson. Mi vizitis la monton Sankt-Mikaelon, kiun mi ne konis.

Kia vido, kiam oni alvenas, kiel mi, en urbo Avranches, ĉe fino de tago! La urbo situas sur monteto; kaj oni kondukis min en publikan ĝardenon ĉe la urba rando. Mire mi ekkriis. Senmezura maro etendiĝis antaŭ mi, senfina, inter du disaj bordoj, kiuj malaperas malproksime en la nebulo. Kaj meze de tiu vastega flava maro, sub la ora kaj plenluma ĉielo, situas, malbrila kaj pinta, stranga monto inter la sablaĵoj. La suno ĵus malaperis, kaj sur la ankoraŭ flama horizonto desegniĝis profilo de tiu fantazia roko, kiu portas sur sia supro fantazian monumenton.

Je tagiĝo mi iris al ĝi. La maro estis malalta, kiel hieraŭ vespere, kaj mi rigardis antaŭ mi stariĝon, laŭ mia aliro, de surpriziga abatejo. Post kelkaj horoj da paŝado mi atingis grandegan ŝtonan ŝtipon, kiu portas urbeton superatan de preĝejo. Suririnte mallarĝan kaj krutan straton, mi eniris la plej admirindan gotikan loĝejon, kiun oni konstruis por Dio sur la tero, vastan kiel urbo, plenan da malaltaj ĉambroj surpremataj de arkaĵoj, kaj da altaj galerioj subtenataj de graciaj kolonoj. Mi eniris tiun gigantan granitan juvelon, delikatan kiel punto, kovritan de turoj, graciaj sonorilejetoj, kie staras torditaj

ŝtuparoj kaj kiuj ĵetas al la blua taga ĉielo, al la nigra nokta, siajn kapojn strangajn, kovritajn per kimeroj, diabloj, fantaziaj bestoj, monstraj floroj, kaj estas kunligitaj per maldikaj skulptitaj arkaĵoj.

Kiam mi estis sur la supro, mi diris al la monako, kiu akompanas min: "Patro! kiel bone estas kredeble al vi tie ĉi!"

Li respondis: "Ofte blovegas, sinjoro;" kaj ni ekinterparolis, rigardante la altiĝantan maron, kiu fluas sur la sablaro kaj ĝin kovras per ŝtala kiraso.

Kaj la monako diris rakontojn, ĉiujn malnovajn rakontojn de tiu loko, legendojn, ĉiam legendojn.

Unu el ili forte min trafis. La tieaj homoj, la montanoj, pretendas, ke oni aŭdas nokte parolojn sur la sablaro kaj blekon de du kaproj, unu laŭtan, unu mallaŭtan. Nekredemuloj certigas, ke tio estas krioj de marbirdoj, kiuj similas jen kaprajn blekojn, jen homajn plendojn. Sed malfruiĝintaj fiŝistoj ĵuras, ke ili renkontis, vaganta sur la sablaj montetoj inter la maralfluo, ĉirkaŭ la urbeto tiel ĵetita malproksimen de cetera mondo, maljunan paŝtiston, kiu havas ĉiam la kapon sub mantelo, kaj kondukas, pasante antaŭ ili, kapron kun vira kaj kaprinon kun virina vizaĝo. Ambaŭ havas longajn blankajn harojn kaj senĉese parolas, interdisputante en nekonata lingvo; subite ili ĉesas krii kaj blekas plej laŭte.

Mi diris al monako: "Ĉu vi kredas tion?"



Li murmuris: "Mi ne scias."

Mi diris: "Se ekzistus sur tero aliaj estaĵoj ol ni, kial ni ne konus ilin jam longe; kial vi ne estus ilin vidinta, vi? kial mi ne vidus ilin, mi?"

Li respondis: "Ĉu ni vidas centmilonon de tio, kio ekzistas? Nu, jen vento, plej potenca forto natura, kiu renversas homojn, ŝutigas konstruaĵojn, elradikigas arbojn, altigas maron al akvaj montoj, detruas bordajn krutaĵojn kaj ĵetas ŝipegojn al rokoj; vento, kiu mortigas, siblas, ĝemas, muĝas, — ĉu vi ĝin vidis, kaj povas ĝin vidi? Ĝi tamen ekzistas."

Mi silentis antaŭ tiu simpla argumento. Tiu homo estis saĝa aŭ eble malsaĝa. Mi ne povus diri ĝuste, sed mi silentis. Kion li diris, tion ofte mi pensis.

*3-a de julio.* — Malbone mi dormis. Estas certe hejme febra influo, ĉar mia veturigisto suferas pro mia sama malsano. Revenante hieraŭ, mi rimarkis lian strangan palecon. Mi demandis: "Kion vi havas, Johano?"

"Okazas, ke mi ne plu povas ripozi, sinjoro. Miaj noktoj malbonigas la tagojn. De la foriro de sinjoro, tio ĉi venis al mi, kvazaŭ sorĉaĵo."

La aliaj servistoj sanas tamen; sed tre mi timas esti rekaptata, mi!

*4-a de julio.* — Nu, rekaptita! La antaŭaj premsonĝoj revenas. Ĉinokte mi sentis iun kurbiĝintan super min; li havis la buŝon sur mia, trinkis mian vivon inter miaj lipoj. Jes, li ĉerpis ĝin el mia gorgo, kiel hirudo. Kaj li leviĝis, satigite, kaj mi mem vekiĝis, tiel kontuzita, rompita, neniigita, ke mi ne povis plu min movi. Se tio daŭros ankoraŭ kelkajn tagojn, mi certe reforiros.

*5-a de julio.* — Ĉu mi perdis la prudenton? Kio okazis la lastan nokton, estas tiel stranga, ke konfuziĝas mia kapo, kiam mi pripensas!

Kiel mi agas nun ĉiuvespere, mi estis ŝlosinta mian pordon; poste soifante, mi trinkis duonglason da akvo kaj okaze rimarkis, ke mia karafo estas plena ĝis la ŝtopilo.

Poste mi kuŝiĝis kaj falis en unu el miaj teruregaj dormoj, el kiu min tiris post ĉirkaŭ du horoj ankoraŭ pli akra svingo.

Imagu al vi homon dormantan, kiun oni mortigas, kiu vekiĝas kun tranĉilo en la pulmo kaj stertoras, kovrita de sango, kaj ne plu povas spiri, kaj tuj mortos kaj ne komprenas; jen tio.

Fine rekonsciiĝinte, mi denove soifis. Mi eklumigis kandelon kaj iris al la tablo, sur kiu estis mia karafo. Mi levis ĝin al mia glaso; nenio fluis. — Malplena ĝi estis! Tute malplena! Unue mi nenion komprenis; kaj subite

mi eksentis tiel fortan kortuŝon, ke mi devis sidiĝi, aŭ pli ĝuste mi falis sur seĝon! Poste mi restariĝis salte por ĉirkaŭrigardi! Kaj mi residiĝis, mirigita, timigita, antaŭ la travidebla kristalo! Kun fiksaj okuloj mi ĝin rigardadis, provante diveni. Miaj manoj tremis! Tiun akvon oni do trinkis? Kiu? Mi? Mi sendube! Nur mi povis! Do somnambulo mi estas; mi vivas nekonate tiun duoblan misteran vivadon, kiu dubigas ĉu ekzistas du estaĵoj en ni, aŭ ĉu fremdulo nekonebla kaj nevidebla movas momente, kiam nia animo senkonsciiĝis, nian kaptitan korpon, kiu obeas tiun alian kiel nin mem, pli ol nin mem.

Ha! Kiu komprenos mian abomenindan korpremon! Kiu komprenos la kortuŝon de homo, spirite sana, tute vekita, plena je prudento, kiu rigardas terure tra vitro de karafo iometan akvon malaperintan dum lia dormo! Kaj tie mi restis ĝis tagiĝo, ne kuraĝante reiri la liton.

*6-a de julio.* — Mi freneziĝas. Oni denove trinkis tutan karafon ĉinokte; aŭ pli ĝuste mi ĝin trinkis!

Sed ĉu mi? Ĉu mi? Kiu estus? Kiu? Ho! Dio!

Mi freneziĝas! Kiu min savos?

*10-a de julio.* — Mi ĵus faris strangajn provojn. Certe mi estas freneza! Kaj tamen!

La 6-an de julio, antaŭ kuŝiĝo, mi metis sur mia tablo vinon, lakton, akvon, panon kaj fragojn.

Oni trinkis, — mi trinkis — la tutan akvon kaj iom da lakto. Oni tuŝis nek vinon nek fragojn.

La 7-an de julio mi refaris la saman provon, kiu liveris saman rezulton.

La 8-an de julio mi forigis akvon kaj lakton: nenion oni prenis.

La 9-an de julio, fine, mi remetis sur mia tablo nur akvon kaj lakton, zorge envolvis la karafojn en tukoj el blanka muslino kaj surligis korkojn. Poste mi frotis miajn lipojn, barbon kaj manojn per grafito, kaj mi kuŝiĝis.

Nevenkebla dormo min kaptis, baldaŭ sekvita de terura vekiĝo. Mi ne estis moviĝinta; eĉ miaj littukoj estis senmakulaj. Mi alkuris mian tablon. La tukoj, kiuj enhavis la karafojn, restis senmakulaj. Mi malligis la korkojn, korbatante pro timo. La tutan akvon oni trinkis, la tutan lakton! Ha! Dio! . . . Tuj mi foriros Parizon.

*12-a de julio.* — Parizo. Mi do sensenciĝis en la lastaj tagoj? Mi kredeble estis ludilo erarigita de mia tronerva imago, aŭ eble vere mi estas somnambulo, se mi ne ricevis unu el tiuj influoj konstatitaj sed ne klarigeblaj ĝis nun, kiujn oni nomas sugestoj. Ĉiaokaze mia elmemiĝo atingis frenezecon, kaj dudek kvar horoj da Pariza vivo sufiĉis por min resanigi.

Hieraŭ, post aferkontaktoj kaj vizitoj, kiuj pasigis en mian animon iom da viviga kaj nova aero, mi finis la vesperon en Franca Teatro. Tie oni ludis teatraĵon de Aleksandro Dumas filo, kaj tiu facilmova kaj potenca spirito sanigis min. Certe izoleco estas danĝera por laborantaj prudentoj. Necesaj estas ĉirkaŭ ni homoj, kiuj pensas kaj parolas.

Kiam ni restas solaj longe, ni metas fantomojn en la malplenejon.

Mi revenis la hotelon tre gaja, tra bulvaroj. Dum la kontaktoj kun la homoj, mi songis, ne sen ironio, pri miaj timoj, miaj supozoj de la antaŭa semajno; ĉar mi kredis, jes mi kredis, ke nevidebla estaĵo loĝas en mia hejmo. Kiel malforta estas kaj rapide konfuziĝas, erariĝas nia cerbo, kiam nekomprenebla okazeto nin trafis!

Anstataŭ konkludi per la simplaj vortoj: "Mi ne komprenas, ĉar la kaŭzon mi ne komprenas," tuj ni imagas terurajn misterojn kaj supernaturan povon.

*14-a de julio.* — Festo de la respubliko. Mi promenis tra la stratoj. Petardoj kaj standardoj min amuzis kiel infanon. Tamen estas tre malsprite ĝoji je fiksita dato, pro dekreto de la registaro. La popolo estas malsprita amaso, jen stulte pacienca, jen kruelege ribela. Oni diras al ĝi: "Batalu kontraŭ la najbaro," ĝi batalas. Oni diras: "Voĉdonu por imperiestro," ĝi voĉdonas por imperies-

tro. Poste oni diras: "Voĉdonu por respubliko," kaj ĝi voĉdonas por respubliko.

Ĝiaj gvidantoj estas same malspritaĵ; sed anstataŭ obei homojn, ili obeas principojn, kiuj povas esti nur naivegaj, senfruktaj kaj malveraj, pro tio mem, ĉar ili estas principoj, ideoj donitaj kiel certaj kaj ne ŝanĝeblaj en tiu mondo, kie oni estas certa pri nenio, ĉar lumo estas iluzio, ĉar bruo estas iluzio.

*16-a de julio.* — Mi vidis hieraŭ aferojn, kiuj tre konfuzis min.

Mi vespermanĝis ĉe mia kuzino, sinjorino Sablé, kies edzo komandas regimenton en Limoges. Mi tie renkontis du junajn virinojn, el kiuj unu edziniĝis kun kuracisto, doktoro Parent, kiu tre okupiĝas pri nervaj malsanoj kaj eksterordinaraj rezultoj alportataj en tiu ĉi momento de eksperimentoj pri hipnotismo kaj sugesto.

Li longe rakontis pri mirindaj rezultoj ricevitaj de anglaj sciencistoj kaj medicinistoj de la Nancy'a skolo.

La faktoj rakontitaj de li ŝajnis al mi tiel strangaj, ke mi eldiris min tute nekredanta.

"Ni estas," li certigis, "baldaŭ malkovrontaj unu el plej gravaj sekretoj de naturo; mi volas diri unu el ĝiaj plej gravaj sekretoj sur tiu ĉi tero, ĉar certe ĝi posedas aliajn multe pli gravajn tie, en la steloj. De kiam la homo pensas kaj scias diri kaj skribi sian penson, li sentas sin tuŝe-

tata de mistero ne penetrebla al liaj krudaj kaj neperfek-taj sentkapabloj; li klopodas anstataŭi per sia inteligenta penado la senpovecon de siaj organoj. Kiam tiu inteli-genteco estis ankoraŭ embria, tiu incitado de la nevide-blaj fenomenoj sin montris per formoj triviale timigaj. De tio venis la popolaj kredoj al supernaturo, legendoj pri vagantaj spiritoj, feoj, gnomoj, reaperuloj, eĉ, mi diros, la legendo pri Dio, ĉar niaj komprenaĵoj je krean-to-laboranto, el kia ajn religio ili estas, aperas ja kiel plej mezvaloraj, plej nekonsenteblaj elpenaĵoj, kiuj naskiĝis el la timigita cerbo de la kreitaĵoj. Nenio estas pli vera ol tiu eldiro de Voltaire: "Dio kreis la homon simila al si, sed la homo pri Dio same faris."

"Sed de iom pli ol unu jarcento, oni ŝajne antaŭsen-tas ion novan. Mesmer kaj iuj aliaj metis ĝin sur neatend-itan vojon, kaj ni ricevis vere de tri aŭ kvar jaroj tre surprizigajn rezultojn."

Mia kuzino, ankaŭ nekredanta, ridetis. Doktoro Pa-rent diris al ŝi: "Ĉu vi volas, ke mi provu vin hipnoti, sin-jorino?"

"Jes, mi volas.

Ŝi sidiĝis en seĝegon, kaj li komencis ŝin fikse rigardi, ensorcante. Mi mem sentis min subite iom konfuzita, kun fortaj korbatoj kaj premo en la gorgo. Mi vidis la okulojn de sinjorino Sablé peziĝantajn, ŝian buŝon kun-premiĝantan, ŝian bruston spiregantian.

Post dek minutoj ŝi dormis.

”Iru post ŝin,” diris la medicinisto. Kaj mi sidiĝis posten. Li metis en ŝian manon vizitkarton kaj diris: ”Tio ĉi estas spegulo; kion vi vidas en ĝi?”

Ŝi respondis: ”Mi vidas mian kuzon.”

”Kion li faras?”

”Li tordas siajn lipharojn.”

”Kaj nun?”

”Li tiras fotografaĵon el sia poŝo.”

”Kia estas tiu fotografaĵo?”

”Lia.”

Estis vere! Kaj tiu fotografaĵo estis liverita al mi tiun saman vesperon ĉe hotelo.

”Kia li estas sur tiu portreto?”

”Li staras kun ĉapelo en mano.”

Do ŝi vidis sur tiu karto blanka, kvazaŭ sur spegulo.

Terurigite, la junaj virinoj diris: ”Sufiĉe! Sufiĉe!”

Sed la doktoro ordonis: ”Vi leviĝos morgaŭ je la oka; poste vi iros al via kuzo en lia hotelo; vi petegos lin, ke li pruntedonu al vi kvin mil frankojn postulatajn de via edzo, kaj kiujn vi redonos je lia estonta vojaĝo.”

Poste li vekis ŝin.

Reirante al la hotelo mi pripensis tiun kuriozan provon; min atakis duboj, ne pri la absoluta, nesuspektebla verdiremo de mia kuzino, kiun mi konas de infana aĝo kiel fratinnon, sed pri ebla trompo de la doktoro. Ĉu li ne



kaŝis en ŝia mano spegulon, kiun li montris al la dormanta juna virino samtempe kun sia vizitkarto? Profesiaj ĵonglistoj faras aferojn multe pli strangajn.

Mi do reiris la hotelon kaj kuŝiĝis.

Nu, hodiaŭ matene, ĉirkaŭ la sepa kaj duono, min vekis mia ĉambristo, kiu diris:

”Sinjorino Sablé petas tuj paroli al la sinjoro.”

Mi rapidege vestis min kaj akceptis ŝin.

Ŝi sidis, tre konfuzita, kun mallevitaj okuloj, kaj ne levante sian vualon, diris:

”Kara kuzo, mi devas peti grandan servon de vi.”

”Kian, kuzino?”

”La eldiro tre ĝenas min, kaj tamen mi devas. Mi bezonas, nepre bezonas kvin mil frankojn.”

”Kiel? Vi!”

”Jes, mi, aŭ pli ĝuste mia edzo, kiu al mi komisiis ilin trovi.”

Tiel mirigita mi estis, ke mi balbutis miajn respondojn. Mi demandis min, ĉu eble ŝi mokas min, kiel doktoro Parent; ĉu ne tio ĉi estas tutsimple ŝerco, antaŭe preparita, kaj bonege ludata.

Sed kiam mi ŝin rigardis atente, ĉiuj miaj duboj malaperis: ŝi tremis de korpremo, tiel dolora estis al ŝi tiu peto, kaj mi komprenis, ke ŝi havas la gorĝon plena de singultoj.

Mi sciis, ke ŝi estas tre riĉa, kaj rediris:

”Kiel? Via edzo ne havas kvin mil frankojn je sia dispono? Nu! Pripensu. Ĉu vi estas certa, ke tial vi estis komisiita ilin pruntepreni?”

Ŝi sanceliĝis kelkajn sekundojn, kvazaŭ ŝi tre klopodus memori, kaj respondis:

”Jes . . . Jes . . . mi estas certa.”

”Ĉu li skribis al vi?”

Ŝi denove ŝanceliĝis, pripensante. Mi divenis la turmentantan laboron de ŝia penso: ŝi ne sciis; ŝi sciis nur, ke ŝi devas pruntepreni de mi kvin mil frankojn por sia edzo. Do ŝi kuraĝis mensogi.

”Jes, li skribis.”

”Kiam do? Nenion vi diris al mi hieraŭ?”

”Hodiaŭ matene mi ricevis lian leteron.”

”Ĉu vi povas ĝin montri?”

”Ne . . . ne . . . ne . . . ĝi enhavis aferojn tro personajn . . . mi ĝin . . . bruligis.”

”Ĉu via edzo faras ŝuldojn?”

Ŝi ankoraŭ ŝanceliĝis kaj murmuris: ”Mi ne scias.”

Mi krude eldiris:

”Sed mi ne havas nun uzeblajn kvin mil frankojn, mia kara kuzino.”

Ŝi ellasis kvazaŭ ĝemon.

”Ho! Ho! mi petegas, petegas, ilin trovu . . .” Ŝi ekscitegiĝis, kunigis la manojn, kvazaŭ ŝi preĝus al mi! Mi

rimarkis tonŝanĝon de ŝia voĉo; ŝi ploris kaj balbutis, persekutate, regate de la nemalobeebla ordono ricevita.

”Ho! ho! mi petegas . . . se vi sciuz, kiel mi suferas . . . mi nepre bezonas ilin hodiaŭ.”

Mi ŝin kompatis.

”Vi havos ilin baldaŭ, mi promesas.”

Ŝi ekkriis:

”Ho! dankon! dankon! Kiel bona vi estas!”

Mi rekomencis. ”Ĉu vi memoras, kio okazis ĉe vi hieraŭ?”

”Jes.”

”Ĉu vi memoras, ke Doktoro Parent vin hipnotis?”

”Jes.”

”Nu! li ordonis, ke vi hodiaŭ matene venu al mi por pruntepreni kvin mil frankojn, kaj nun vi obeas tiun ordonon.”

Dum kelkaj minutoj ŝi pripensis kaj respondis:

”Sed mia edzo ilin postulas.”

Dum unu horo mi klopodis ŝin konvinki, sed mi ne sukcesis.

Post ŝia foriro mi tuj vizitis la doktoron; li estis forirona; kaj li aŭskultis min, ridetante. Poste li diris:

”Nun, ĉu vi kredas?”

”Jes, necese.”

”Ni aliru vian parencinon.”

Jam ŝi dormetis, lacega, sur sofo. La kuracisto palpis ŝian pulson, rigardis ŝin dum iom da tempo kun la mano levita al ŝiaj okuloj, kiuj iom fermiĝis sub la netolerebla penado de tiu hipnota povo.

Kiam ŝi estis dormanta:

”Via edzo ne plu bezonas la kvin mil frankojn. Vi do tuj forgesu, ke vi petis vian kuzon, ke li pruntedonu ilin al vi, kaj se li preparolos, vi ne komprenu.”

Poste li vekis ŝin. Mi tiris el mia poŝo monujon:

”Jen estas, mia kara kuzino, kion vi petis de mi hodiaŭ matene.”

Tiel forte ŝi miris, ke mi ne kuraĝis insisti. Tamen mi klopodis reakrigi ŝian memoron, sed ŝi certeme neadis, kredis, ke mi mokas ŝin, kaj fine preskaŭ koleris.

.....  
Jen! Mi ĵus revenis la hotelon kaj ne povis tagmanĝi, tiel forte min konfuzis tiu eksperimento.

*19-a de julio.* — Min mokis multaj personoj, al kiuj mi rakontis tiujn ĉi aventuron. Mi ne plu scias, kion mi devas pensi. La saĝulo diras: Ebla?

*21-a de julio.* — Mi vespermanĝis en Bougival kaj pasigis la vesperon ĉe la balo de boatistoj. Vere, ĉio dependas de lokoj kaj ĉirkaŭoj. Supernaturon kredi en la insulo Grenouillère, estus frenezegaĵo . . . sed sur la supro de

Sankt-Mikaela Monto? . . . sed en Hindujo? Ni estas terure regataj de la medio. Mi revenos hejmen en la proksima semajno.

*30-a de julio.* — De hieraŭ mi estas hejme; ĉio estas bona.

*2-a de aŭgusto.* — Nenio nova; estas belega vetero. Mi pasigas la tagojn rigardante la fluadon de Seno.

*4-a de aŭgusto.* — Disputoj inter miaj servistoj. Ili pretendas, ke oni nokte rompas glasojn en la ŝrankoj. La ĉambristo kulpigas la kuiristinon, kiu kulpigas la kudristinon, kiu rekulpigas la du aliajn. Kiu estas kulpa? Malicega estus la trovinto.

*6-a de aŭgusto.* — Ĉifoje mi ne estas freneza. Mi vidis . . . mi vidis . . . mi vidis! . . . Mi ne plu povas dubi . . . mi vidis! . . . mi ankoraŭ estas malvarma ĝis la ungoj . . . mi ankoraŭ tremas ĝis en ostoj . . . mi vidis! . . .

Mi estis promenanta je la dua horo, en plena sunlummo, ĉe mia rozejo . . . en aleo de aŭtunaj ekflorantaj rozuj.

Dum mi halte rigardis unu *géant des batailles*, kiu surhavis tri belegajn florojn, mi vidis, mi klare vidis, tute apud mi, ke la trunketo de unu el tiuj rozoj fleksiĝas, kvazaŭ nevidebla mano tordas ĝin; kaj ĝi rompiĝas, kva-

zaŭ tiu mano deŝiris ĝin! Poste la fioreto leviĝis, laŭ kurba linio, kiun sekvus brako portanta ĝin al buŝo, kaj ĝi restis pendanta en la diafana aero, tute sola, senmova, teruriga ruĝa makulo, je tri paŝoj de miaj okuloj.

Duonfreneza, mi ĵetis min al ĝi! Nenion mi trovis: ĝi estis malaperinta. Tiam min kaptis freneza kolerego kontraŭ mi mem; ĉar ne estas permesite al prudenta kaj serioza homo havi tiajn viderarojn.

Sed ĉu vera videraro? Mi turnis min al la roztrunketo, kaj tuj trovis ĝin sur la arbeto, freŝe rompita, inter la du ceteraj rozoj restintaj en sia loko.

Tiam mi revenis hejmen, kun konfuzigita penso; ĉar mi estas certa nun, certa kiel pri la alternado de tagoj kaj noktoj, ke apud mi ekzistas ia nevidebla estaĵo, kiu sin nutras per akvo kaj lakto, kiu povas tuŝi aĵojn, ilin preni kaj transmeti; ĝi estas sekve el materia esenco, kvankam ne atingebla de miaj sentoj, kaj ĝi loĝas, kiel mi, en mia hejmo . . .

*7-a de aŭgusto.* — Mi dormis trankvile. Ĝi trinkis akvon el mia karafo, sed ne malkvietigis mian dormadon.

Mi demandas min, ĉu mi estas freneza. Ĝuste kiam mi estis promenanta, en plena sunlumo laŭlonge de la rivero, mi ekhavis dubojn pri mia prudento, ne malprecizajn dubojn, kiel ĝis nun, sed precizajn, absolutajn dubojn. Mi vidis frenezulojn; mi konis iujn, kiuj restis inteligen-

taj, klarpensaj, eĉ klarvidaj pri ĉiuj vivaj okazoj, escepte pri unu punkto. Ili ĉion preparolis klare, facile, profunde, kaj subite ilia penso, tuŝinta la rifon de ilia frenezeco, sur ĝi dispeciĝis, disiĝis kaj dronis en tiu ĉi terura kaj furioza maro, plena de saltantaj ondoj, nebuloj, ventegoj, kiun oni nomas "la malprudento."

Certe mi kredus, ke mi estas freneza, se mi ne estus konscia, se mi ne perfekte konus mian staton, se mi ne ĝin analize esplorus kun plena klarvideco. Ĉu mi do, fine, estus nur rezonanta halucinulo? Ĉu en mia cerbo aperis nekonata konfuzaĵo, unu el tiuj konfuzaĵoj, kiujn hodiaŭ studi kaj precizigi klopodas la fiziologoj; kaj tiu konfuzaĵo estus elvokinta en mia spirito, en la ordo kaj logiko de miaj ideoj, larĝan disrompiĝon? Similaj fenomenoj okazas dum songado, kiu nin promenigas tra plej malverŝajnaj fantasmagorioj, ne nin surprizante, ĉar la kontrolilo, la kontrolsento dormas dum la imaga kapablo maldormas kaj agadas. Ĉu povas esti, ke unu el la nesentebaj klavoj de la cerba klavaro en mi paralizigiĝis? Homoj, post kelkaj okazaĵoj, perdas memoron pri nomoj aŭ verboj aŭ ciferoj aŭ nur pri datoj. La lokaleco de ĉiuj eroj de la penso estas nun elpruvita. Ja, kio miriga, se la kapablo vidi nerealecon de kelkaj halucinoj en mi nun estas malvigla!

Ĉion ĉi mi pripensis, irante laŭ la rivera rando. La suno superheladis la riveron, faris la teron ĉarmega, ple-

nigis mian okulon per amo al vivo, al hirundoj, kies vigleco gajigas mian rigardon, al randaj herboj kies zume-to dorlotas mian aŭdon.

Iom post iom, tamen, neklarigebla ĝeneco eniris min. la forto, ŝajne okulta forto, malvigligis min, haltigis min, malhelpis mian pluan iradon, min realvokis posten. Mi sentis tiun doloran reirbezoon, kiu ĉirkaŭpremas nin, kiam ni lasis hejme amatan malsanulon kaj kiam nin ek-kaptas antaŭsento pri la pli graviĝo de ĝia malsano.

Do, mi kontraŭvole revenis hejmen, estante certa, ke mi tie trovos malbonan sciigon, leteron aŭ depeŝon. Nenio estis; kaj mi restis pli surprizita kaj malkvieta, ol se mi denove estus havinta fantazian vidaĵon.

*8-a de aŭgusto.* — Hieraŭ mi travivis abomenan vesperon. Ĝi ne plu montras sin, sed mi sentas ĝin apud mi; ĝi rigardas, eniras, superregas min, pli timinda, tiel sin kaŝante, ol se ĝi per supernaturaj fenomenoj montrus sian nevideblan kaj senĉesan ĉeeston.

Mi tamen dormis.

*9-a de aŭgusto.* — Nenio, sed mi timas.

*10-a de aŭgusto.* — Nenio; kio okazos morgaŭ?



*11-a de aŭgusto.* — Ĉiam nenio; mi ne plu povas resti hejme kun tiuj ĉi timado kaj pensado enirintaj mian animon; mi tuj foriros.

*12-a de aŭgusto.* — Dum la tuta tago, mi volis foriri; mi ne povis. Mi volis fari tiun ĉi liberagon tiel facilan, tiel simplan — eliri — suriri mian veturilon por veturi al Rueno — mi ne povis. Kial?

*13-a de aŭgusto.* — Kiam oni estas atingita de iaj malsanoj, ŝajnas ke ĉiuj risortoj de la fizika estaĵo rompiĝis, ĉiuj energioj malaperis, ĉiuj muskoloj malstreĉiĝis, ĉiuj ostoj moliĝis kvazaŭ karno kaj la karno fluidiĝis kvazaŭ akvo. Tion ĉi mi sentas en mia morala estaĵo en stranga kaj malesperiga maniero. Mi ne plu havas ian forton, ian kuraĝon, ian mastradon de mi mem, eĉ ian kapablon vekti mian volon. Mi ne povas plu voli; sed iu volas anstataŭ mi, kaj mi obeas.

*14-a de aŭgusto.* — Mi pereis! Iu posedas mian animon kaj ĝin regas! Iu posedas mian animon kaj ĝin regas! Iu ordonas ĉiujn miajn agojn, ĉiujn movojn, ĉiujn pensojn. Mi ne apartenas plu al mi mem; mi estas nur sklava kaj terurigata rigardanto de ĉiuj agoj, kiujn mi faras. Mi deziras eliri. Mi ne povas. Ĝi ne volas; kaj mi restas hejme, sensenca, tremanta, en la brakseĝo, kie ĝi tenas min

side. Mi deziras nur min starigi, min leveti, por ke mi povu ankoraŭ kredi, ke mi mastras min mem. Mi ne povas! Mi estas kvazaŭ alnajlita al mia seĝo; kaj mia seĝo algluiĝas al la planko tiel, ke nenia forto povus nin eklevi.

Kaj subite, mi devas, devas, devas iri en la fundon de mia ĝardeno por preni fragojn kaj ilin manĝi. Kaj mi tien iras. Mi deŝiras fragojn kaj ilin manĝas. Ho! Dio mia! Dio mia! Dio mia! Dio mia! Ĉu ekzistas unu Dio! Se estas unu, li min liberigu, savu, helpu! Pardonu! Kompatu! Indulgu! Savu min! Ho! Kia sufero! Kia turmento! Abomenaĵo!

*15-a de aŭgusto.* — Certe, tiel estis superregata kaj ordonata mia kompatinda kuzino, kiam ŝi de mi petis kvin mil frankojn. Ŝi suferis fremdan povon enirintan en ŝin, kiel alia animo, kiel animo parazita kaj superregema. Ĉu la mondo tuj finiĝos?

Sed tiu, kiu min regas, kiu estas tiu nevideblulo? tiu nekoneblulo, tiu vagisto de supernatura raso?

La nevidebluloj ekzistas do! Sed, kial de la komenco de la mondo ili ne ankoraŭ sin montris precizmaniere, kiel ili faras rilate al mi? Neniam mi legis ion similan al tio, kio okazis en mia hejmo. Ho! se mi povus ĝin forlasi, se mi povus foriri, forkuri kaj ne reveni! Mi estus savita, sed mi ne povas!

*16-a de aŭgusto.* — Mi povis elkuri hodiaŭ dum du horoj, kvazaŭ malliberulo, kiu okaze trovis malfermita la pordon de sia ĉelo. Mi subite sentis, ke mi estas libera kaj ke ĝi estas malapude. Mi tuj ordonis, ke oni jungu la ĉevalojn kaj mi veturis Ruenon. Ho! kia ĝojo, esti kapabla diri al obeanto: "Ruenon iru!"

Mi haltis ĉe la biblioteko kaj petis, ke oni pruntedonu al mi la grandan traktaton de doktoro Hermann Herestauss pri nekonataj loĝantoj de la antikva kaj moderna mondoj.

Poste, reirante mian kaleŝon, mi volis diri: "Al la fervojo!" kaj mi kriis — mi ne parolis, mi kriegis — tiel laŭte, ke la preterirantoj sin turnis: "Hejmen," kaj mi falis, de korpremo senkonsciita, sur la veturilan kusenon. Ĝi estis retrovinta kaj rekaptinta min.

*17-a de aŭgusto.* — Ha! kia nokto! kaj tamen ŝajnas, ke mi devus ĝoji. Ĝis la unua horo post noktomezo mi legis! Hermann Herestauss, doktoro de filozofio kaj teologio, rakontis historion kaj aperojn de ĉiuj nevideblaj estaĵoj vagantaj ĉirkaŭ la homo aŭ elrevitaj de li. Li priskribas ilian devenon, ilian regejon, ilian potencon. Sed neniu el ili similas mian persekutanton. Ŝajnus, ke la homo, de la tempo de sia ekpensado, antaŭsentis, antaŭtimis novan estaĵon, pli fortan ol li, lian estontan posteulon en tiu ĉi

mondo; ŝajnus, ke sentante ĝin baldaŭa, kaj ne povante antaŭscii la esencon de tiu ĉi mastro, la homo kreis el sia terurado, tutan fantazian popolon da okultaj estaĵoj, konfuzaj fantomoj naskitaj el timo.

Leginte do ĝis la unua horo, mi poste sidigis min apud mian malfermitan fenestron por malvarmigi mian fruntan kaj pensojn ĉe la kvieta vento blovetanta el la malumaĵo.

Estis agrable, estis varmete. Kiel mi estus antaŭe ŝatinta tian nokton!

Neniu luno. La steloj, sur fundo de nigra ĉielo, tremete lumetis. Kiu loĝas tiujn mondojn? Kiaj formoj, kiaj vivantoj, kiaj bestoj, kiaj plantoj estas tie? La pensantoj en tiuj malproksimaj mondoj, kion pli ol ni scias ili? Kion pli ol ni povas ili? Kion de ni ne konatan ili vidas? Unu el ili iam, trairinte la spacon, ĉu li ne aperos sur nia tero por ĝin submeti, kiel iam la normandoj traveturis maron por submeti pli malfortajn popolojn?

Tiel malfortaj, tiel senarmilaj, tiel nesciantaj, tiel etaj ni mem estas, sur tiu ĉi kotero turniĝanta en akva guto!

Mi ekdormetis, tiel revante ĉe la malvarmeta vento vespera. — Nu, post ĉirkaŭ kvardek-minuta dormo, mi senmove malfermis okulojn, vekita de ia konfuza kaj stranga kortuŝo. Unue mi nenion vidis; poste, subite, ŝajnis, ke unu paĝo de la libro lasita malfermita sur la tablo ĵus turniĝis propramove. Neniu blovo trairis la

fenestron. Mi miris kaj atendis. Post ĉirkaŭ kvar minutoj mi vidis, mi vidis, jes mi vidis proprukule ke alia paĝo leviĝas kaj refaldiĝas sur l'antaŭan, kvazaŭ iu fingro ĝin foliumis. Mia brakseĝo estis libera, ŝajnis libera; sed mi komprenis, ke ĝi estas tie, ĝi, sidanta en mia loko, legante. Per furioza salto, per salto de ribeliĝinta bruto, kiu tuj traboros sian dresiston, mi trairis mian ĉambron por ĝin kapti, ĉirkaŭpremi, mortigi . . . Sed la seĝo antaŭ mia atingo renversiĝis, kvazaŭ oni forkuris de mi . . . la tablo ŝanceliĝis, la lampo falis kaj estingiĝis, kaj la fenestro fermiĝis, kvazaŭ surprizita ŝtelisto, sin apoginte sur la fenestroklapojn, sin ĵetus en la nokton.

Ĝi do forkuris; ĝi timis, timis min, ĝi!

Do . . . do . . . morgaŭ . . . aŭ poste . . . aŭ iun tagon . . . mi do povos teni ĝin en miaj pugnoj kaj frakasi teren! . . . Ĉu ne hundoj kelkfoje mordas, sufokas sian mastron?

*18-a de aŭgusto.* — La tutan tagon mi revis. Ho! jes, mi al ĝi obeos, sekvos ĝiajn puŝojn, plenumos ĉiujn ĝiajn dezirojn, faros min humila, submetita, malkuraĝa. Ĝi estas la pli forta. Sed okazos momento . . .

*19-a de aŭgusto.* — Mi scias . . . mi scias . . . ĉion mi scias! Ĵus mi legis la jenon en *Revo de la Scienca Mondo*:

”Stranga sciigo estas al ni sendita el Rio de Janeiro. Frenezo, epidemio de frenezo, komparebla kun disvastiĝemaj senprudentiĝoj atingintaj la eŭropajn popolojn dum la mezepoko, nun okazas en provinco San-Paŭlo. La loĝantoj, sensenciĝintaj, forlasas siajn domojn, vilaĝojn, kulturejojn; ili pretendas, ke ilin persekutas, posedas, regas, kvazaŭ homan brutaron, estaĵoj nevideblaj kvankam percepteblaj, specoj de vampiroj, kiuj sin nutras el ilia vivo dum ilia dormado, kaj krom tio trinkas akvon kaj lakton, ŝajne forlasante ĉian alian nutraĵon.

Sinjoro profesoro Pedro Henriquez, kun kelkaj spertaj kuracistoj, ekveturis al la provinco por tie esplori la devenon kaj aperojn de tiu ĉi miriga frenezeco, kaj proponi al la imperiestro la agadon, kiu al li ŝajnos plej taŭga por re prudentigi tiun delirantan popolon.”

Ha! Ha! mi memoras, mi memoras la belan brazilan trimaston, kiu preteriris mian domon, reirante Senon, en 8-a de majo lasta. Mi trovis ĝin tiel beleta, blanka, gaja! Sur ĝi troviĝis la estaĵo, veninta de tie, kie naskiĝis ĝia raso! Kaj ĝi vidis min! Ĝi vidis mian hejmon ankaŭ blankan; kaj ĝi saltis el la ŝipo sur la riverrandon. Ho! Dio mia!

Nun mi scias, divenas. La regno de la homo ĉesis.

Ĝi venis, tiu, kiun timis la unuaj terurantoj de la nai-vaj popoloj, Tiu, kiun foradmonis maltrankvilaj pastroj; kiun la sorĉistoj alvokis dum la mallumaj noktoj, ne vid-

ante ankoraŭ ĝian aperon; kiun antaŭsentoj de la unu-momentaj mastroj de la mondo vestis per ĉiaj monstraj au graciaj formoj de gnomoj, spiritoj, feoj, feinoj, koboldoj. Post maldelikataj imagoj de primitiva terurego, pli klarvidantaj homoj ĝin antaŭsentis pli nete. Mesmer ĝin divenis, kaj kuracistoj de dek jaroj jam precize eltrovis la esencon de ĝia potenco antaŭ ol ĝi mem uzis ĝin. Ili ludis per tiu ĉi armilo de la nova mastro, la regado de mistera volo super la homa sklaviĝinta animo! Ili tion nomis magnetismo, hipnotismo, sugesto . . . iel ajn! Mi vidis ilin amuziĝantajn, kvazaŭ malzorgemaj infanoj, per tiu abomena potenco! — Ve al ni! Ve al la homo! Ĝi venis, la . . . la . . . kiel ĝi nomiĝas . . . la . . . la . . . ŝajnas, ke ĝi krias sian nomon . . . kaj mi ne aŭdas . . . la . . . jes . . . ĝi krias . . . mi aŭskultas . . . mi ne povas . . . rediri . . . la . . . horlo . . . mi aŭdis . . . la horlo . . . ĝi . . . la horlo . . . ĝi venis! . . .

Ha! la vulturo manĝis la kolombon, la lupoj manĝis la ŝafon; la leono manĝis la pintkornan bubalon; la homo mortigis la leonon per sago, per glavo, per pulvo; sed la horlo tuj faros el la homo, kion ni faris el la ĉevalo kaj la bovo: sian posedaĵon, sian serviston, sian nutraĵon, per la sola povo de sia volo. Ve al ni!

Tamen besto kelkfoje ribeliĝas kaj mortigas la dresinton . . . mi ankaŭ volas . . . mi kapablos . . . sed necesas ĝin koni, palpi, vidi! Sciencistoj diras, ke okuloj de

bestoj, malsana je niaj, ne vidas kiel niaj . . . kaj mia okulo ne povas ekvidi la nove veninton, kiu min subpremas.

Kial? Ho! mi nun rememoras la vortojn de la monako de Sankt-Mikaela monto: "Ĉu ni vidas centmilon de tio, kio ekzistas? Nu, jen vento, la plej potenca forto natura, kiu renversas homojn, ŝutigas konstruaĵojn, elradikigas arbon, altigas la maron al akvaj montoj, detruas bordajn krutaĵojn kaj ĵetas al rokoj ŝipegojn; vento kiu mortigas, siblas, ĝemas, muĝas, — ĉu vi ĝin vidis, kaj povas ĝin vidi? Ĝi tamen ekzistas."

Kaj mi ankoraŭ pripensis: mia okulo estas tiel senpotenca, tiel neperfekta, ke ĝi rimarkas eĉ ne malmolajn korpojn, se ili estas vitre diafanaj! . . . Se senmetala spegulo baras mian vojon, mia okulo ĵetas min sur ĝin, kiel birdo, enirinta ĉambron, sin batas kontraŭ fenestran vitraĵon. Mil diversaj aĵoj, krome, ĝin trompas kaj erarigas. Kio miriga, do, se ĝi ne povas ekvidi novan korpon traireblan de lumo?

Nova estajo! Kial ne? Certe ĝi devis aperi! Kial ni estus la lastaj? Ni ne vidas ĝin, kiel ĉiujn antaŭ ni kreitajn bestojn? Nur ĉar ĝia esenco estas pli perfekta, ĝia korpo pli delikata kaj finita ol la nia, la nia tiel malfortika, mallerte kombinita, plenigita de organoj ĉiam lacaj, ĉiam trouzitaj kiel tro implikaj risortoj; ol la nia, kiu vivas kiel planto kaj kiel besto, sin pene nutrante per aero, herbo kaj



viando; animala maŝino premata de malsanoj, difektiĝoj, putriĝoj, faletanta, malbone reguligita, naiva kaj stranga, ingenie malbone farita, maldelikata kaj delikata verko, skizo de estaĵo, kiu povus fariĝi inteligenta kaj belega.

Ni estas kelkaj, tiel malmultaj sur tiu ĉi mondo, de la ostro ĝis la homo. Kial ne unu plia, kiam pasis periodo apartiganta la sinsekvajn aperojn de ĉiuj diversaj specoj?

Kial ne unu plia? Kial ne ankaŭ aliaj arboj kun floroj grandaj, brilegaj, odorigantaj tutan regionon? Kial ne aliaj elementoj ol fajro, aero, tero kaj akvo? — Ili estas kvar, nur kvar, tiuj nutristoj de la estaĵaro! Ridinde! Kial ne kvardek, kvar cent, kvar mil? Kiel malriĉa, malgrandaĉa, mizera estas ĉio! Avare donita, senfrukte elpensita, peze farita! Ha! elefanto, hipopotamo, kiel graciaj! Kamelo, kiel eleganta!

Sed vi diras, papilio! fluganta floro! Mi imagas unu, kiu estus granda kiel cent mondoj, kun flugiloj el nedifineblaj formoj, beleco, koloro, movo. Sed mi vidas ĝin . . . de stelo stelen iras ĝi, dorlotante kaj parfumante ilin je harmonia kaj malpeza blovo de ĝia flugo! . . . Kaj la tieaj popoloj rigardas ĝian preteriron, ĝue, rave!

Kion do mi havas? Ĝi, ĝi, la horlo, obsedas min, pensigas pri tiuj frenezaĵoj! Ĝi estas en mi, ĝi fariĝas mia animo; mi mortigos ĝin!

*19-a de aŭgusto.* — Mi ĝin mortigos! Mi ĝin vidis! mi sidiĝis hieraŭ vespere ĉe mia tablo kaj ŝajnis, ke mi atente skribadas. Mi certe sciis, ke ĝi venos vagadi ĉirkaŭ mi, apude, tiel proksime ke mi eble povus ĝin tuŝi, kapti? Kaj tiam! . . . tiam mi havus la forton de senesperuloj; mi havus miajn manojn, genuojn, bruston, frunton, dentojn, por ĝin sufoki, pisti, mordi, disŝiri.

Kaj mi ĝin spionis per ĉiuj miaj superekscititaj organoj.

Mi estis lumiginta du lampojn kaj ok kandelojn sur mia kameno, kvazaŭ en tiu ĉi heleco mi povus ĝin trovi.

Antaŭ mi estis mia lito, malnova kverka lito kun kolonoj; dekstre mia kameno; maldekstre pordo zorge malfermita, post longa malfermado por ĝin allogi; post mi tre alta spegulŝranko, kiun mi uzas ĉiutage por min razi kaj vesti, kaj kie mi kutimas min rigardi de kapo ĝis piedoj ĉiufoje, kiam mi preteriras.

Do, mi ŝajnis min skribanta por ĝin trompi, ĉar ĝi ankaŭ observis min; kaj subite mi sentis, mi certiĝis, ke ĝi legas super mia ŝultro; ke ĝi tieas, apud mia orelo.

Mi rektigis min, kun etenditaj manoj, turnante min tiel rapide, ke mi preskaŭ falis. Nu?.. estis hele kiel tage kaj mi ne vidis min en mia spegulo! . . . Malplena ĝi estis, klara, profunda, plena de lumo! Mia figuro ne estis sur ĝi . . . kaj mi estis rekte antaŭe! Mi vidis la grandan

vitraĵon diafanan de supro ĝis malsupro. Kaj tion mi rigardis per frenezulaj okuloj; kaj mi ne kuraĝis plu antaŭeniri, mi ne kuraĝis min ekmovi sentante tamen, ke ĝi estas tie ĉi, sed ke ĝi denove sin eltirus, ĝi, kies nevidebla korpo malaperigis mian rebrilon.

Kia timo! Kaj jen subite mi ekvidis min tra nebulo, sur fundo de la spegulo, tra nebulo kvazaŭ tra akva tavolo; kaj ŝajnis, ke tiu ĉi akvo forglitas dekstren, malrapide, precizigante mian figuron sekunde-post-sekunde. Estis kvazaŭ fino de eklipso. Kio min kaŝis, tio ŝajnis ne havi nete limigitajn randojn, sed estis ia maldiafana travideblaĵo, iom post iom klariĝanta.

Fine mi povis min vidi tute, kiel ĉiutage, kiam mi rigardas min.

Mi vidis ĝin! . . . En mi restis terurego, kiu min tremetigas ankoraŭ.

*20-a de aŭgusto.* — Ĝin mortigi, kiel? Ĉar mi ne povas ĝin atingi? Veneno? Sed ĝi vidus, ke mi ĝin miksas kun akvo; kaj cetere, ĉu niaj venenoj efikus sur ĝian nesenteblan korpon? Ne . . . ne . . . sen ia dubo . . . Sed? . . . sed?  
 . . .

*21-a de aŭgusto.* — Mi venigis seruriston el Rueno, kaj mendis por mia dormoĉambro feran fenestrokovrilon, kian havas en Parizo kelkaj privataj hoteloj ĉe la strat-

etaĝo, pro timo al ŝtelistoj. Li krom tio fabrikos similan pordon. Mi estos konsiderata, kiel timemulo, sed indiferentas al mi . . .

*10-a de septembro.* — Rueno, Hotelo Kontinenta. Farita . . . farita . . . sed ĉu ĝi mortis? Mia animo estas konfuzegita de la viditaĵo.

Hieraŭ do, post kiam la seruristo aranĝis la feran pordon kaj la fenestrokovrilon, mi lasis ĉion malfermita ĝis noktomezo, kvankam komencis malvarmiĝi.

Subite mi sentis, ke ĝi estas tie, kaj ĝojo, freneza ĝojo kaptis min. Mi malrapide starigis min, kaj paŝis dekstren, maldekstren, longatempe, por ke ĝi nenion suspektu; poste mi deprenis miajn ŝuojn kaj metis miajn pantoflojn kvazaŭ senzorge; kaj mi fermis mian fenestrokovrilon, kaj trankvile repaŝante al la pordo, ĝin mi ankaŭ ŝlosegis. Tiam reirante al la fenestro, mi ĝin riglis per aldona seruro, kies ŝlosilon mi metis en mian poŝon.

Subite mi komprenis, ke ĝi sin movegas ĉirkaŭ mi, ke ĝi siavice timas, ke ĝi ordonas malfermi. Mi preskaŭ obeis; mi ne cedis, sed, apogante la dorson al la pordo, mi ekmalfermis ĝin ĝuste nur por ke mi povu dorsen transpaŝi; kaj ĉar mi estas tre alta, mia kapo tuŝis la pordosupron. Mi estis certa, ke ĝi ne povis forkuri, kaj mi ĝin enŝlosis solan, tute solan. Kia ĝojo! Mi kaptis ĝin! Tiam mi kuris malsupren; mi prenis en mia salono, sub

mia dormoĉambro, du lampojn, elverŝis ilian oleon sur la tapiŝon, la meblojn, ĉien; kaj mi ekbruligis kaj mi forkuris post duobla ŝlosado de la granda enirpordo.

Kaj mi kaŝis min en la fundon de mia ĝardeno, en densaĵo de laŭroj. Kiel longe! kiel longe! Ĉio nigris, mutis, senmove; neniu aerblovo, neniu stelo, nur amasegoj da nuboj, kiujn oni ne vidis, sed kiuj premis mian animon pezege, pezege.

Mi rigardis mian hejmon kaj atendis. Kiel longe! Mi jam kredis, ke la fajro estingiĝis propramove, aŭ ke ĝin estingis ĝi, Ĝi, kiam unu el la malsupraj fenestroj krevis pro puŝado de la brulo, kaj flamo, granda flamo ruĝa kaj flava, longa, mola, karesanta, altiĝis laŭ la blanka muro kaj ĝin ĉirkaŭlekis ĝis la tegmento. Lumeto trakuris la arbojn, branĉojn, foliojn, kaj tremeto, tima tremeto ankaŭ! La birdoj vekiĝis; la hundo komencis hululi; ŝajnis, ke aperas la tago.

Du aliaj fenestroj tuj krevis, kaj mi vidis, ke la tuta malsupro de mia hejmo estas nur terura fajrejo. Sed krio, abomena krio, superakra, korŝiranta, virina krio traflugis la noktaĵon kaj du subtegmentaj fenestretoj malfermiĝis. Mi estis forgesinta miajn servistojn! Mi vidis ilian frenezigitan vizaĝon, iliajn svingiĝantajn brakojn! . . .

Tiam, sensencigita de abomeno, mi ekkuris al la vilaĝo, kriegante: "Helpu! helpu! Fajro! fajro!" Mi renkontis homojn jam alkurantajn kaj kun ili returnis por vidi.

La domo nun estis nur teruriga kaj belega fajramaso, grandega fajrejo lumiganta la tutan landon, fajrejo kie brulas homoj, kaj kie Ĝi ankaŭ brulas, Ĝi, Ĝi, mia kaptito, la nova estaĵo, la nova mastro, la horlo!

Subite la tuta tegmento falegis inter la murojn kaj vulkano da flamo elŝprucis al la ĉielo.

Tra ĉiuj fenestroj malfermitaj al la brulegejo, mi vidis tiun kuvegon de fajro, kaj mi pensis, ke ĝi estas tie, en tiu forno, mortinta . . .

Mortinta? Eble? . . . Ĝia korpo? Ĝia korpo, kiun trairis taglumo, ĉu ĝi ne estus nedetrubla per rimedoj detruantaj la nian?

Se ĝi ne estus mortinta? . . . eble nur la tempo efikas sur la nevideblan kaj timindan estaĵon. Kial tiu diafana korpo, tiu nekonebla korpo, tiu spiriteca korpo, se ĝi devus ankaŭ timi la malsanojn, vundojn, kriplaĵojn, frutempan detruon?

Frutempa detruo? La tuta terurego de homo devenas de ĝi! Post homo, la horlo! — Post tiu, kiu povas morti ĉiutage, ĉiuhore, ĉiuminute, ĉiuvunde, aperis tiu, kiu mortos nur je sia difinita horo, je sia minuto, ĉar ĝi atingis limon de sia ekzisto.

Ne . . . ne . . . sen ia dubo . . . sen ia dubo . . . ĝi ne  
mortis . . . Sed . . . sed . . . ĉu do mi devos min mor-  
tigi, mem? .....

.....

**Guy de Maupassant**

*Tradukis "Stellano"*

## Ĉu ekzistas anĝeloj? (3)

### Pli da prezentado

**K**iam Hagson la unuan matene transiris la katedran placon, li vidis Fromanon sidi sur benko en arb-ombro. Li legis.

Hagson haltis. Li rekonis la ruĝajn, grizajn kaj nigrajn sagojn de la librokovrilo, kiuj montris rekte supren al la ĉielo. Estis gaja kaj agrabla somera mateno kaj la ĉielo estis blua. La vera ĉielo, ne tiu de la usona feliĉo.

—Saluton, li vokis gaje, ĉu vi legas?

Froman rigardis malrapide supren. Li estis same elegante vestita kiel lastfoje, sed ne havis la saman kostumon sur si. Sidante sur la benko li aspektis relative dika, kvin aŭ ses kilograma maldikiĝo plibeligus la portreton sufiĉe multe. Ni vidu kiom la bankaj ŝtuparoj povos kontribui. Sed ankaŭ kiel estis, ne estis maltaŭge.

—Nu, li diris fine, mi ripetas. Li faris mallongan paŭzon. Mi ankoraŭ ne scias, kio mi volas fariĝi. Kaj tion oni devas scii, alimaniere la tuta laboro estas vana.



—Estas multo elektebla, se oni havas perspektivojn, Hagson diris. Alimaniere oni ne bezonas streĉi sin.

—Por nun mi decidis atendi antaŭ ol mi decidiĝos. Estas same bone havigi al si ioman superrigardon pri la banknegocoj unue. Sed ĉi tio estas io, pri kio mi intencas informiĝi dumtempe.

Froman malfermis la libron kaj legis.

—”Memorinda en parto II. Se vi volas ekhavi memfidon kaj ricevi kaj reteni la konfidon de la homoj ...” Ne ne pri ĉi tio mi pensis. ”Memoru, ke kiom ajn subulan postenon vi havas, vi devas aranĝi, ke viaj kamaradoj kaj viaj superuloj ĉiam scias, kiu vi estas kaj kion vi faras. Ju pli granda estas la entrepreno, des pli grava estas ĉi tiu regulo.” Ĉi tie estas kelkaj linioj ankaŭ por vi. ”Atentu pri via aspekto. Igu iun, kiu certe kompetentas pri tio, prizorgi vin.” Mi kunportis kravaton por vi.

Li enŝovis la manon en la poŝon kaj eltiris nigran kravaton, kiun li per memkomprenebla gesto transdonis al Hagson.

—Se vi estas tiu, kiu prezentos min, vi devas surhavi decas kravaton. Bonvolu!

Konsternita, Hagson akceptis la kravaton. Li fiksrigardis al ĝi dum longa momento, antaŭ ol li enpoŝigis ĝin.

—Dankon. Malriĉa pedelo ne malakceptas kravaton. Sed kion vi deliris pri prezentado?

—Jes, estas skribite ĉi tie, ke oni estu prezentita, kiam oni komencas novan laboron.

—Knabo, diris Hagson kaj rigardis al la preĝeja turhorloĝo. Mi devas fakte sidi dum momento.

Estas diferenco inter homoj, diris li, kiu estis pendigota kaj puŝigis sin antaŭ la pastron. Tio estis, kion Hagson provis klarigi al Jan. Kiam reĝimento ricevas novan brigadestron, la tuta reĝimento almarŝas al akcepto kun dio, reĝo, patrolando, muzikorkestro kaj standardoj komence. Kelkfoje estas preskaŭ same bele, kiam venas nova bankdirektoro. Sed malsame, se venas duonsoldato aŭ nova pedelo! Neniun interesas via nomo kaj postulas nur unu aferon: ke oni movu la kruojn.

—Neniun?

—Neniun ajn! Sed post dek kvin jaroj la plej multaj konos vian nomon, ĉar vi estos farinta tiom da stultaĵoj, ke ili estos lernintaj vian nomon.

Froman aŭskultis atente.

—Gravas fariĝi konata, li obstinis. Estas skribite ĉi tie, ke ekzistas neeblaĵoj por tiu, kiu ne scias, kion li volas, alimaniere ekzistas nur malfacilaĵoj.

—Vi ne konas la vivon, diris Hagson. Ĝi estas io alia ol libroj! Cetere mi povas rakonti al vi, ke eĉ ne unu el dek en la banko scias, kiu Marcus estas, kaj ili tamen eltur-niĝas.

—Oni ja velis, diris Froman.

El la verda katedrala placo ili envenis mallarĝan strateton. La domoj estis konstruitaj el griza, simpla ŝtono. Estis malhele kaj vente inter ili. Plej supre la ĉielo brilis blue. Blanka floka nubeto ruliĝis kiel kato de tegmento al tegmento en suna spacekskurso. Jan haltis kaj rigardis al la nubeto.

—Rigardu la ĉielon, vi, diris Hagson, vi ne vidos ĝin antaŭ la vespero.

La hezitemo de Jan daŭris nur dum momento, poste Hagson kuntiris lin internen. Kelkajn paŝojn pluen laŭ la strateto estis pordo, kiu kondukis al la banka postkorto. Inter luksa aŭto kaj kelkaj malplenaj lignaj kestoj je unu flanko kaj kompakta muro da kuirhaladzo je la alia — fenestro estis malfermita en la kuirejo de la banko — ili zigzagis al la malantaŭa pordo. Sur la pordo estis kvar ŝildetoj.

*AS Haringobanko*

*Harbanko*

*Harcity*

*Harminster*

— Kiu estas harministro? Froman miris.

—Antaŭ la sinjoro Harministro vi ne bezonos riverenci. Li estas telegramadreso.

Malantaŭ la defluejo estis kaŝita butono. Kiam oni premis ĝin, aŭdiĝis sono en la pordo, kiu malfermiĝis

por kelkaj milimetroj. Hagson malfermis ĝin. Malhela truo gapis al ili.

—Eniru, Hagson diris, estos pli gaje malantaŭ la angulo.

Ili eniris mallarĝan, malhelan koridoron, malgrandigon de la vojeto tie ekstere. Ŝtuparo kondukis supren maldekstre, suben venis anstataŭe malforta pisodoro.

—La necesejo de la pedeloj, Hagson klarigis. Ekzistas pli bela kaj eleganta kvin etaĝojn supren, ĝin vi rajtos uzi, kiam vi estos kontoristo.

Se Jan komprenis la kaŝitan kritikon en la rimarko de Hagson, li ne montris tion per sia mieno. Li estis ĉiukaze prezentita por la unua pedelo Lans, kiu estis estro super la pedeloj kaj kiu diris, ke Froman unue lernu rekonigi la homojn kaj orientiĝi kaj tial sekvu kun Hagson dumtempe, kaj la duan pedelon Larsson, kiu estris super la stampilo AERPOŝTE kaj zorgis, ke leteroj kaj leterkopioj eniru la ĝustan lokon en la truaktoj.

La cetera prezentado malaperis en la ĥaoso de homoj, kiuj alfluis el ĉiuj direktoj. Froman rimarkis du aferojn: ĉiuj havis sulkitajn fruntojn kaj tenis ion en la mano: pipon, gazeton, cigaredon, aktujon aŭ mansakon. Kvieti babilado plenigis la aeron.

Unu aŭ alia fraŭlino ĵetis rigardon al Froman, jen ĉio. La demando estas, ĉu li rimarkis tion.

—Jörgensen kaj Clemens venos suben je la deka, tiam vi renkontos ilin, Hagson diris. Jörgensen estas en la provizejo, Clemens estas la plej mallaborema diablo, kiu iras en ŝuparo. Nun ili sidas ĉe la poŝtmalfermado.

Kiam fariĝis kviete ĉe la enirejo, Hagson komencis klarigi la sekretojn de sia profesio. Fariĝis detaliĉa preskribo de INFORMOJ kaj la respondeco, kiu kuŝis sur li, kaj la atento, kiun oni postulas de li. Kun prava fiero li montris fine la folion super la telefono. Li tradukis vorton post vorto kaj klarigis, kiel oni uzas la esprimojn.

Froman demandis kompreneble, kion signifas la ciferoj.

—Estas telefonnumeroj. Se venas anglo, oni telefonas al 189 pri interpretisto, se venas hispano, oni telefonas al 510.

—Sed Larsson 161?

—Larsson, la dua pedelo, estas nekredebla. Li parolas flue germane, france, angle, hispane, itale, finne kaj nederlande, kaj li povas balbuti turke, portugale kaj greke kaj kvin aŭ ses aliajn lingvojn.

—Kial ne estas nur lia telefonnumero?

Hagson larĝigis la brakojn.

—Tio estas banksekreto! Cetere mi konas mem tiom, ke mi neniam bezonas telefoni.

Tiel komenciĝis la taga laboro, baldaŭ la orkestro ludis je plena vigoro. Por la neinicitoj simfonio de senceco, por la inicitoj, kiu povis aŭdi, plene komprenebla.

—Kiom da kontoristoj ekzistas? Froman miris, aŭskultinte dum iom da tempo.

—Iaj tricent!

—Ĉu ili estas ĝentilaj?

—Dependas! Bankkontoristoj estas kiel virinoj, ili havas siajn periodojn. La unuan, duan kaj trian ili estas kiel blekantaj leonoj, cetere ili estas ĝentilaj kiel ŝafidoj. Meze de la monato oni ankaŭ gardu sin iom. Ekzistas iu aŭ alia, kiu estas malbonhumora la tutan monaton, sed je tiomaj tio ne tre gravas.

—Ĉu vi konas iliajn nomojn?

—Kompeneble!

—Kaj ili konas vian nomon?

—Ĉiuj konas min, sed tio dependas de tio, ke mi laboris en la stokejo dum tri jaroj. Mi ne diros pli. Sed daŭros dek kvin jarojn antaŭ ol Marcus scios, kiu vi estas, kaj tiom longe li ne restos, kaj minimume dek jarojn antaŭ ol la alia personaro scios tion.

—Kontisto Stenman scias ĉiukaze.

—Li! Li nek memoras nomojn nek vizaĝojn!

—Sed ĉu li povas promocii homojn sen scii, kiujn li promocias?

—Li ne faras tion. Tion faras Marcus kaj ... Ssst!

Kontisto Stenman eniris. Li paŝis antaŭen.

Froman stariĝis trankvile antaŭ li kaj diris:

—Ho jen, bonan matenon, kontisto Stenman, bela vetero hodiaŭ!

Stenman ekstremis kaj suprenrigardis.

—Pardonon! Bonan matenon, bonan matenon, kompreneble estas bela vetero! Belega!

—Ĉu la kontisto ne rekonas min?

Stenman streĉis la cerbon, skuis la kapon, denove streĉis la cerbon.

—Mi bedaŭras! La vizaĝo rememorigas pri io kaj ankaŭ la voĉo! Ĉu estis en Lökken pasintsomere?

—Ne, fi, kontisto, tio estis maltaŭga. Vi ricevos nur B en rememoro!

—Mi fakte malfacile rememoras vizaĝojn, Stenman senkulpigis sin. Mi renkontas tro da homoj. Ĉu estis ... li serĉis febre en sia memoro ... ĉu eble estis ... ja, nun mi rememoras, vi sidis apud mi ĉe la ĵaŭda klubo pasintsemajne. Agrable renkonti vin denove. Saluton!

Stenman triumfis. Li eltenis la dekstran manon kaj metis la maldestran sur la ŝultron de Froman.

—Estis sufiĉe bona diveno, sed ne estis plentrafo, Froman diris. Retroiru iom en la tempo kaj vi ricevos plentponenton.

—Nee, mi rezignas nun. Sed kiam mi vidas la vizaĝon, mi certas, ke ni havis agrablan tempon kune. Diru, kiam estis tio?

—Kontisto Stenman restos seniluziigita. Froman diris. Mia nomo estas Jan Froman kaj mi estis dungita kiel pedelaspiranto antaŭ semajno.

Stenman turniĝis ĉirkaŭ si mem plenan rondiron. Tio okazis tiel rapide, ke Froman ricevis malvarman aerfluo en la vizaĝon. Kiam Stenman haltis, li estis fajre ruĝa en la vizaĝo kaj la aerfluo varma.

—Ĉu vi staras tie kaj primokas min, ulo! Ĉu vi ne ...

Li faris tri paŝojn antaŭen kurrapide, haltis, repaŝis malantaŭen kaj siblis:

—Estu certa, ke mi rememoros kaj vian vizaĝon kaj vian nomon ĝis alia fojo!

Froman rigardis post li, kiam li malaperis en la ŝtuparo, turnis sin poste al Hagson kaj diris kun levita monstrofingro:

—Li scias, kiu mi estas!

Hagson sentis mildan kapturniĝon.

—Ne kredu, ke vi ricevis dumvivan amikon, li diris.

**John Einar Åberg**

*Tria ĉapitro el samtola romano*

*El la sveda tradukis Franko Luin*



## La infano estas malsana

**L**a kurteno sur la pordo moviĝis, kaj la glate kombinita kapo de la flegantino de la Ruĝa Kruco aperis en la biblioteko-ĉambro. Transe oni aŭdis mallaŭtan ĝemon.

La profesoro nenion aŭdis. Profundiĝinta en sia laboro, li sidis ĉe la skribotablo, kaj lia plumo kuris rapide kiel sago trans la blankan paperfolion. Sur la papero aperis unu linio rapide post la alia, la malgrandaj literoj, ordigitaj pure unu al alia kiel perloj; la skribaĵo mem estis tiel potenca, logika kaj senerara, tiel militema kiel la penso, kiun ĝi en la vortoj entenis — kiel militkriego en la jarcenta batalo: tie ĉi estas la scienco, ekstere la fanatikeco de la kredo. La spirito de la instruitulo estas akrega, lia koro glacie malvarma, lia animo pura kiel kristalo ... En lia mano flamas la torĉo de la scio. Kaj dum li per sia blindiganta lumo lumigas la sekretplenan krepuskobrilon de la altaj preĝejoj, subite disfluas la bonodorfumo, pli malbrile lumetas la kandeloj kaj la formoj

de la sanktuloj kun oraj kronoj sur la kapoj, kaj la sango-makulitaj martiroj ĉirkaŭe tremas ...

”Sinjora moŝto!”

La virino de la Ruĝa Kruco mallaŭte parolis al la profesoro: ”Sinjora moŝto, ĉu vi bonvolus veni tien ĉi, la fraŭlineto estas tre maltrankvila.”

Tuj li formetis la plumon, ĉar li rememoris, ke lia infano estas malsana.

Lia filineto kuŝas tie inter disĵetitaj kusenoj, kun malordaj haroj, malbrilaj okuloj kaj febroardanta vizaĝo.

”Ĉu estas vi paĉjo? Sidiĝu ĉi tien, mi volas ion diri al vi.”

La profesoro kaptas ambaŭ ŝiajn manojn. Malgrandaj, varmegaj manoj, molaj kaj senfortaj kiel silkaj fadenaroj.

”Paĉjo, mi volas ion diri al vi ... Ĉu vi scias? Mi kredas, ke mi mortos ...”

La profesoro subite konvulsie premas al si la tutan korpon, malpezan kiel plumo, kies blonda kapeto lace falas sur lian ŝultron. Malespere li rigardas en la ridetantan vizaĝeton.

Tiel, precize tiel, ridetis al li antaŭ jaroj alia febrovarmega vizaĝo, tute simila al ĉi tiu. Ridetanta infanvizaĝo — rememoro al dolĉa juneca revo. Febra estis ĉi tiu revo kaj dolĉa, tre dolĉa kaj tre mallonga — tiel mallonga preskaŭ kiel la kiso, kiun du amantoj iam interŝanĝis, dum florodora printempa mateno ...

La infano komencis mallaŭte paroli: "Mi ne volas morti, estas pli bele vivi ... mi bedaŭras pro miaj belaj vestoj kaj miaj floroj, kaj mia birdo kaj ankaŭ pro vi paĉjo ..."

La profesoro kisis la malgrandan, fermitan manon; la infano parolis plue, mallaŭte kaj per disrompitaj frazoj: "Neniu min povas resanigi, escepte unu: la mirakla virgulino ĉe la lago ... Jes! fratino Herta diris al mi, vi scias, la bela pala fratino en la monaĥinejo ... Foje vespere ŝi kondukis min al koridoro, kiam la luno brilis rekte tiel hele tra la altaj fenestroj ... Jes! ŝi diris al mi en la orelon: La virgulino de la lago loĝas tie trans la akvo, sur rokpinto en kapelo ... Orgenludon kaj kandellumon ŝi tre amas, pro tio brulas tie tage kaj nokte cent kandeloj, kaj la orgeno ludas. Ŝi havas potencon super la vivo de junaj knabinoj, kaj en la ĉielo oni neniam rifuzas peton de ŝi ... Kiam juna knabino kuŝas mortonta, oni devas tien sendi pian virinon kaj anonci la danĝeron ... La pia virino devas alporti donace tiom da dikaj vakskandeloj, kiom da jaroj havas la juna knabino, poste ŝi devas meti orumitan kronon sur ŝian kapon kaj rampi sur la genuoj ĉirkaŭ la Maria-altaro kaj preĝi sep 'estu benata'."

La malgranda knabino haltis, pripensis iom, kaj aldiris: "Mi estas dekkvar-jara, oni bezonas do dek kvar kandelojn, belajn, dikajn kandelojn ... La virino Nani povus iri, la lavistino, ŝi povas bone preĝi ... sed ankaŭ Resi

devas iri, ĉar Nani trinkas volonte, kaj ŝi povus eble fortrinki miajn kandelojn ...”

Sensencaĵo! Sed kion ne faras homo por sia sola, malsana infano? Kaj fine, dek kvar kandelojn valoras ja la kaprico de malsana infano.

La virino Nani do foriris kaj ankaŭ Resi kun ŝi. Ili veturis en granda veturilo kun ŝirmtegmento, ambaŭ kompreneble en dimanĉa vesto. La virino Nani estis fiera pro sia misio kvazaŭ ĉina ambasadoro, Resi ankaŭ antaŭĝojis pro la amuzo kun la junuloj, kiujn ili ĉe la vojcelo renkontos.

Dume la profesoro flegis mem sian filineton kaj pro tio forgesis sian libron.

Kaj ĝi estis libro! Precizega, glacie malvarma kaj kristale pura kiel ĝia verkisto ...

En unu loko ĝi diras: ”... Kompatato kaptas la homon, kiam li rigardas la malĝojajn oferojn de la mirkredo. Maljunuloj kaj infanoj, fanatikuloj kaj kripluloj, ĉiuj, ĉiuj ili ŝanceliĝe kuras al la mirakla idolo. Kion la freŝa aero de la montoj ankoraŭ povus kuraci, tion sufokas la bonodorfumo kaj la aero malmovigita de la kandelvaporo; la malsanajn nervojn, kiuj sopiras al trankvilo, turmentas la ekscito de malgaja kulto, kaj la lastaj groŝoj, pene ŝparitaj eble por medikamento kaj fortiga nutraĵo, estas englutataj de nesatigebla oferskatolo ...”

La virino Nani faris siajn preĝojn en plej bela ordo, aldonis eĉ, laŭ sia propra bontrovo, kelkajn "Patro nia," ĵetis en la skatolon tion, kio decis al virgulino, kaj rapidis por reiri, ĉar ŝi ne volis, ke iu alia ol ŝi lavu la fraŭlineton kaj ŝin vestu — se ŝi estus dume mortinta.

La fraŭlineto tamen ne mortis, sed ŝi resaniĝis tute bone.

La profesoro povis sian verkon en trankvilo fini kaj eldoni.

"Pli da lumo! de doktoro Mikrokosmos," tia estis la titolo.

Jen estas libro! Nobla, militema, nekontraŭstarebla; tion povis skribi nur homo, kiu forskuis la katenojn de miljara antaŭjuĝo, kiu antaŭ neniu idolo sian genuon fleksas, ĉar li nenion atendas kaj nenion esperas kaj ĉion en si mem trovas. Homo, kiu nenion timas, ankaŭ ne la morton, ĉar li scias, ke ĝi estas nenio alia ol la fino de organa vivo, ne pli terura ol la naskiĝo. Homo, kiu scias, ke la mondo ne estas dia domo, sed granda laborejo ...

La amikoj de la civilizacio akceptis la libron entuziasme; tri nigraj pastroj trempis siajn plumojn en flavan galon, por skribi tuj rebatan respondon.

La filineto baldaŭ estis tiel resanigita, ke oni povis kun ŝi iri al banloko. Ili iris al banejo ĉe la lago.

"Ni devas supreniri kaj viziti la sanktan virgulinon," diris la filino, "kaj danki al ŝi pro ŝia favoro ... ĉar iam

knabino faris al Virgulino solenan promeson, sed ŝi ne plenumis ĝin; kiam venis la tago kaj horo, la filino sentis subite pikon en la koro kaj mortis ...”

Kion ne faras homo pro amo al sia malsana infano? Kaj poste ... iom da promenado sur monto ne malutilas!

Malrapide ili paŝis laŭlonge de foliara bordo. De la kapelo sonis triumfante la sonoriloj.

Ili iris mano en mano, la filino en tute blanka vesto, sian pajlan ĉapelon sur la brako.

La mirakla Virgulino akceptis siajn gastojn en festa vestaĵo, orbrodita, riĉe ornamita velurvesto; kun granda arĝenta krono sur la kapo. Je ŝiaj piedoj brulis cent kandeloj, ĉirkaŭ ŝia trono ŝvebis blankaj nuboj de bonodor-fumo, kaj la orgeno muĝis. La pastro montris al la kredantoj la sanigan relikvon; la knabino ĵetis sin rapide sur la genuojn, kaj la profesoro, sola staranta inter la genufleksantoj, kredeble subite perdis unu ĉemizbutonon, ĉar li kliniĝis malsupren kaj komencis fervore serĉi sur la fundo.

La ŝtonaj lipoj de la Virgulino ridetadis rigide. Se ili estus povintaj paroli, ili estus dirintaj: ”Granda vi estus, ho, vi homo, granda, nobla kaj potenca, se nur via infano ne estus kelkafoje malsana.”

**Ferenc Herczeg**

*El "Hungaraj rakontoj"*

*El la hungara tradukis A. Panajott*

**[www.omnibus.se/inko](http://www.omnibus.se/inko)**

**ISBN 91-7303-183-6**